Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 21 — Trimonata **3/91**

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktisto: ERTL István

Teknikaj redaktistoj: Stefan MacGILL
KOVÁCS Márta

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Esperanto-fako, Universitato ELTE/BTK
H-1364 Budapest, Pf. 107
☎ + 36-1-1180-966/185

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

Enhavo

DAHLENBURG, d-ro T., Densa programo en bonetosa nordo (Konferenca raporto) 1
Rezolucio akceptita de la 25a Konferenco de ILEI 3
Proklamo de Voss – proklamo, kiu sintezas (konferenca rezulto) 4
KURUCZ, Géza, Ideoj lige kun la demandoj de IPR 1/91 (Reago) 6
Rezolucio pri edukado akceptita de la Komitato de UEA en Bergeno 7
Rezolucio pri la Jaro de la Familio, proklamita de UN por 1994, akceptita de UEA 8
MACGILL, Stefan, ILEI labortable (La novaj laborорganoj de la Ligo) 9
KURUCZ, Géza, Esperanto-konkurso por lernejanoj 12
WANDEL, Amri, Perkomputora Instruado de Esperanto (Konferenca prelego) 14
NGO, Chan Ly, Jubileo de agad-plenaj jaroj (raporto el Vjetnamio) 16
FISCHER, Rudolf, La ĵusa enkonduko de fremdlingva instruado en la elementajn lernejojn de Gemanujo – ĉu nova ŝanco por Esperanto? 17
***** MEZE: ENKETILO PRI INSTRUADO kaj MENDILO POR 'TENDARAJ TAGOJ' *****
SYMOENS, Edward, Tri jaroj en la bilanco (1988-91) 23
STROBL, Katalin, Apliko de la komunika metodo en la instruado de Esperanto (3a parto) 33
Koncize ni notas (mallongaj raportoj) smg 42

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto : Stefan MacGill, Esö 7.III, H-1034 Budapest, Hungario.
Mesaĝoj tra HEA: (36 1) 1560.244 (telefone aŭ fakse)
Kunordigado, planado, eldonado, rilatoj UEA kaj la movado.

Vicprezidanto : Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono; tel.(314) 869-2303
Eksteraj rilatoj, statistikado, instruado de infanoj

Sekretario : Marija Beloševiĉ, Miškinina 130, YU-4100 Zagreb-Crnomerec, Kroatio, Jugoslavio;tel. (38 41) 57.60.92
Landaj sekcioj, membro-varbado, ekzamenoj

Kasisto : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby; tel. (46 415) 501.52
Financo, konferenca organizado

Vic-sekretario : D-ro Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normal Univ., CN-430070 Wuhan, Ĉinio
Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio

Estrarano pri instruado Barcsay Zsuzsa, Bem Rakpart 25/B, H-1011 Budapest, Hungario; tel. (36 1) 201-2342
Servoj al instruistoj, metodikaj kursoj, trejnado de instruistoj.
Faka programo de Konferenco 92

Estrarano pri universitatoj D-ro So Ĵinsu, Koreio, Dept. de Ekonomiko, Univ. Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900; tel. (0331) 281-5500, faks (0331) 281-3604
Universitatoj, Konferenco 1994

Densa programo en bonetosa nordo

3 – 8 aŭgusto 1991

En la norvega urbo Voss, proksime al Bergen, kolektiĝis 65 esperantistoj el 21 landoj, kiuj interesiĝas aŭ profesie okupiĝas pri la instruado de fremdaj lingvoj, inkl. Esperanton. La internacia konsisto kaj engaĝiĝo de la ĉeestantaro en tiaj fakaj aranĝaĵoj de ILEI ĉiam denove pruvas, ke celkonscia instruado de Esperanto enhavas pli da diskutendaj problemoj, ol oni supozas deekstere:

- Ĉu nia ĝisnuna lingvopolitika linio, influanta ankaŭ la instruprogramojn de Esperanto, en sufiĉa grado respegulas la demokratiemon en la popoloj? (Stefan MacGill (NZ/H): Tireso, Raumo kaj nun...? ; François Degoul (F): Strategii adekvate al la monda konsciiĝo pri internaj valoroj de Esperanto)
- Ĉu la vaste propagandata travidebleco de la gramatika strukturo de Esperanto ne subfosas seriozan instruadon kaj lernadon? (Till Dahlenburg (G): Pri vojoj kaj celoj de la Esperanto-instruado
- Ĉu la produktado de multekostaj vidbendaj serioj surbaze de ekzistantaj kursmaterialoj estas realigebla kaj sufiĉe vaste aplikota en Esperanto-medio? (Mila v.d.Horst-Kolinska (NL): Produkto de vidbendserio kun kurso por komencantoj, uzeble internaciskale)
- Ĉu ne necesas urĝe reagi al la kreskantaj bezonoj de nia junularo/studentaro je pli adekvata enhavo kaj aĝkonvena maniero de lingvoalproprigo? (Rudolf Fischer (G): Talentuloj en elementaj lernejoj konatiĝu kun Esperanto!; Zsuzsa Barcsay (H): Planado de somera internacia gimnazia semajno; Alonzo Nuñez (E): Projekto pri preuniversitataj kursoj; Ronald Glossop (Usono): E-instruado al naturdotitaj infanoj; Amri Wandel (IL): Komputila instru-programo por universitataj kursoj)
- Ĉu ni jam sufiĉe utiligas en la instruado la flekseblecon de la lingvo Esperanto por montri eĉ nacispecifan metrikarton? (Lu Jixin (CN): "Invit' al Ĉinesko".

En asembleaj kunvenoj la prezidanto de ILEI, Edward Symoens, donis detalan analizon pri la farita laboro de la Ligo en la tri jaroj de la nun finiĝanta oficperiodo (ekz-e eldonado, internaciaj ekzamenoj, kunlaboro kun neesperantistaj organizaĵoj, rilatoj al ekstereŭropaj sekcioj ktp.) kaj aparte memorigis pri la senlaca kaj sindona laboro de la forpasinta estraranino Audrey Childs-Mee. La farita laboro estas aprobita kaj dankita de la asembleo.

Post tio okazis la elekto de la nova estraro (el la malnova estraro denove kandidatiĝis MacGill, Andreasson kaj Zhang Danchen; la aliaj, Symoens, Jones kaj Dahlenburg ne plu kandidatiĝis).



La konsisto de la nova estraro estas donita kovrile kun adresoj, kaj en 'ILEI labortable' kun detaligo pri la tasko-divido.

Krome estis detale pritraktataj ŝanĝproponoj de la statuto de ILEI (sub gvido de Oene Hoekstra) kaj precizigataj estontaj projektoj de ILEI por la periodo ĝis 1994, ekz.

- okazigo de regula gimnazia semajno por gelernantoj dum ILEI-konferencoj ekde 1992;
- starigo de diversaj komisionoj, ekz. gazetar-serva, terminologia, statuta, ekster-rilata k.a.;
- disvastigo de trejnadaj kursoj por instruistoj kaj daŭrigo de Internaciaj Metodikaj Seminarioj;
- kontaktoj kun fakaj instruistaj organizaĵoj en la unuopaj landoj.

La konferenco estis tre zorge preparita kaj organizita fare de Lisbet kaj Bertil Andreasson, kiuj ebligis al ĉiuj vere agrablajn laboreblecojn en la Popolaltlernejo de Voss, kiu estas bone ekipita per konferenc-salonoj kaj somere ofertas sian internulejon kiel turisthejmon.

Inter la vesperaj programeroj okazis vidbend-prezentado fare de Günther Becker (G) i.a. pri la 24-a ILEI-konferenco en Kubo. Aparte menciindaj estas la kulturfonaj kontribuoj de Odd Tangerud kaj Jon Hommesmo pri la norvega poezio kaj pri la popolaltlerneja tradicio en Skandinavio.

Personaj rememoroj de Catina Dazzini, Olle Olsson, Marin Bacev kaj Bertil Andreasson pri signifoplenaj okazaĵoj dum la dudekkvin-jara historio de ILEI donis al tiu ĉi konferenco plian valoron. La konferenco proponas lingvopolitikan kaj strategian rezoluciojn, kiujn vi trovos apude.

Voss, la 8-an de aŭg. 1991
Till Dahlenburg

REZOLUCIO AKCEPTITA DE LA 25a KONFERENCO de ILEI

kun 65 partoprenantoj el 21 landoj, okazinta en Voss, Norvegio de la 3a ĝis la 8a de aŭgusto, 1991.

La konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

konscia, ke necesas partoprenigi ĉiun individuan homon, ĉu junan ĉu pli aĝan, en la tutmondaj agadoj por paca evoluado kaj por savi la naturan vivmedion, kaj ke por tio ĉiu povu kontribui siajn ideojn ne repuŝate en indiferentecon pro lingva diskriminacio,

proponas kunlaboron al la respondecaj aŭtoritatoj progresigi la instruadon de la plene evoluinta neŭtrala internacia lingvo Esperanto en lernejoj en la kadro de eduko al tutmonda demokratio kaj al respondeco ankaŭ rilate estontajn generaciojn de la homaro.



La novelektitaj estraranoj pozas por profesia fotisto en Voss: De maldekstre: Marija Beloševi ć, prof. Ronald Glossop, Barcsay Zsuzsa, Stefan MacGill, Bertil Andreasson.

PROKLAMO DE VOSS

Esperanto kiel funkcianta lingvo

En la disvastiga laboro, unuarange gravas emfazi, ke Esperanto estas jam funkcianta lingvo kun la propraj historio, kulturo kaj kulturportaj valoroj kaj strebi, ke ĝi ĝuu sur plej diversaj kampoj samajn rangon, rajton, rimedojn kaj prestiĝon kiel etna lingvo de simila disvastiĝinteco, kaj krome, ke ĝi estu estimata pro sia unika tutmonda rolo kaj sia potenciala kontribuo al la demokratiigo de la komunikado.

Esperanto kaj strategio

Kerne al la strategia debato estas malharmonio inter desupremaj kaj desubemaj agantoj. Evidentas unuflanke, ke klopodoj devigi la uzon de Esperanto desupre al iu nekonvinkita popolo ne nur fiaskos, sed estas kontraŭ la etika bazo de la lingvo. Klaras aliflanke, ke dum desuba laboro konstante necesas, de si mem ĝi malverŝajne kondukos al signifa kresko de la lingvo aŭ ĝia komunumo. Pli saĝa strategio estas la kombino de ambaŭ vojoj per zorge elektitaj projektoj, tiel ke la desupre akiritaj decidoj kaj permesoj renkontu desube kreitan deziron aŭ bezonon.

La celo al kvalito estas laŭdinda, sed necesas konstati, ke la kvalito plej ofte fontas el kvanto, kaj tiun kvanton povas krei la instruado, kadre de kiu apartan gravecon havas la adekvata kaj laŭeble oficiala trejnado de instruistoj.

Esperanto kaj naciaj lingvoj

Esperanto utilas por protekti la rajtojn de minoritataj lingvoj; la esperantistoj oponu neniun specifan lingvon – naciaj lingvoj estas respektendaj, sendepende de grandeco. Esperantistoj tamen malkontentu pri la uzo de naciaj lingvoj por transnaciaj celoj, precipe kiam tio diskriminacias kontraŭ neparolantoj de tiuj lingvoj kaj minacas la pluvivon de minoritataj lingvoj kaj kulturoj. Vanas batali rekte kontraŭ difinitaj grandaj lingvoj, sed necesas malkonstrui la mitojn, kiuj subtenas ilian misuzon, zorgante fari tion per pravigeblaj argumentoj kaj ne per niaj propraj mitoj.

Esperanto – ĝia destino

La tradicia termino "fina venko" kun siaj militecaj subsignifoj transformiĝu al konstanta agado por ebligi la uzon de Esperanto inter tiu kreskanta nombro de personoj celantaj transnacian komunikadon. La plukreo de aŭtonoma Esperanta kulturo estas valora, necesa, sed ne sufiĉa antaŭkondiĉo por tiu strebo; sekve konflikto inter kultur-flegemaj kaj finvenkemaj esperantistoj estas transpontebla – ili povas trovi abundajn terenojn, kie utile kunlabori.

Signifa kvanta kaj kvalita salto en la uzo de Esperanto ne okazos:

- **sole** per la klopodoj de la nunaj parolantoj, kiuj havas nek la rimedojn nek la potencon tion solaj realigi;
- **sen** la klopodoj de la nunaj esperantistoj teni la lingvon evoluanta, la komunumon vivanta, la aplikeblojn vastiĝantaj, ĝis potencialaj aplikistoj kun siaj lertoj kaj rimedoj malkovros kaj ekspluatos la lingvon.

Kvankam naivaj revoj pri baldaŭa "fina venko" povas naski frustrojn, certe iel forigendajn, estus tamen grava eraro elimini deziron pri signifa disvastiga sukceso, ĉar tion farinte, la komunumo riskus nenion rimarki, se subite kaj neatendite maturiĝus kondiĉoj, kiuj malfermus la vojon al tio.

La nuna tasko estas krei tiujn antaŭkondiĉojn, kies manko aŭ malforto bremsus Esperanton en la koncerna momento ĉe transiro al tiu vast-skala uzado.

8 aŭgusto, 1991

Proklamo, kiu sintezas

La jubilea dudek-kvina konferenco de ILEI akceptis la supran dokumenton por kontribui al la strategiaj debatoj en la Movado. Por situi ĝin historie, memoru la Deklaracion de Tireso (Svedio) en 1969 kaj la Manifeston de Raŭmo (Finnlando) en 1980. Konferencinte en Norvegio, dudek kaj dek jarojn post tiuj eventoj kaj aliaj dokumentoj, ŝajnis oportune rekonsideri ilin. Nia rezulto nek celas lanĉi novan direkton, nek proklami novan revolucian malkovron, sed resumi tion, kion la plimulto de esperantistoj jam decidis kaj komprenis por si mem, kaj iel sintezi la pretendojn de la antaŭaj dokumentoj kune kun taŭga sinteno por instruistoj.

La proklamo koncize redonas la esencon de la artikolo en IPR 1991/2, kiu disvolvis la rilatan konferencan temon, kaj kiu iom pli adekvate defendas kaj klarigas la asertojn de la proklamo. Ĝia sintezo provas trakti la kontraŭdirojn inter propagandemaj, finvenkemaj kaj kultur-flegemaj esperantistoj, inter desupristoj kaj desubistoj kaj inter Esperanto kaj aliaj lingvoj.

Ni esperas, ke la ĉefa debato fluanta el nia proklamo disvolviĝos en aliaj movadaj organoj, al kiuj ni sendis la tekston.

Ne volante dilui la fakan karakteron de IPR, ni tamen vokas al reagoj kaj komentoj ankaŭ ĉi tie, ne nur de niaj membroj sed ankaŭ de aliaj aktivaj movadanoj, kiuj per tio povos renkonti nian Ligon kaj ĝian agadon.

REAGO:

IDEOJ LIGE KUN LA DEMANDOJ DE IPR 1/91

Koncerne la demandojn pri la Manifesto de Raŭmo mi povas formuli miajn pensojn jene:

1. La slogano "Esperanto – la dua lingvo por ĉiu" estis antaŭtempa kaj diplomatie tro hasta. Mi konsideras pli realisma kaj celkonforma la sloganon: "Esperanto fariĝu unu el la oficialaj lingvoj dum internaciaj kontaktoj". Per ĉi-lasta slogano ni ebligas alternativon: por supernacia funkcio oni povas libere elekti iun ajn mondan lingvon (=tradicia vojo) aŭ la internacian (=revolucie nova). Ni, esperantistoj, ne devas (nek povas) altrudi nian proponon. Ni neniam devas elpaŝi kontraŭ naciaj lingvoj respektataj de ni ĉiuj. Ni estas ja profunde konvinkitaj ke pro sia karaktero malgraŭ portempaj sukcesoj ili neniam estos kapablaj plenumi tiun rolon, al kiu estas destinita la internacia lingvo Esperanto. Tamen ni ne trompu nin! Nuntempe kaj dum ankoraŭ pluraj jaroj la "dua lingvo por ĉiu" estas senbaza, utopia iluzio. La venko venos multe pli malfacile, tra kompromisoj.

2. Esperantistojn kunligas neordinara interesiĝo pri kulturoj de aliaj nacioj. Ni ne havas do kulturon apartan, sed kvante kaj eble ankaŭ kvalite alian: ni strebas al universaleco. El tio venas ke ni estas kaj ankoraŭ longe estos ne kreantoj, sed fidelaj perantoj de kulturaj valoraĵoj. Kaj se estas tiel, ni devas doni prioritaton ne al la originala, sed al la tradukita literaturo en Esperanto, simple tial ke ĉi-lasta servas al nia strebado multe pli ol la alia. Ni volas servi, ne regi. Por ni ne originaleco, sed la valoro de la ideoj gravas. Nur literaturo saturita de valoraj ideoj akiros renomon al la internacia lingvo.

3. Miaopinie, se temas pri la karakterizaj trajtoj de Esperanto, la unuan lokon okupas ne propedeŭtiko, sed la ebleco kontakti novmaniere, sen diskriminacio. Ni celas ja kvalite novan kontakton en internaciaj rilatoj. Propedeŭtiko estas nur akompana karakterizilo de la internacia lingvo. Due, mi nepre emfazus la simplecon gramatikan de Esperanto, substrekante ties logikon kaj ellerneblecon por ĉiu meze inteligenta homo. Tiu trajto multe gravas ĉe lingvo, kiu pretendas esti kandidato por supernacia interkompreniĝo tra la tuta mondo.

4. Ĉiam ankoraŭ ni povas fidi nur niajn proprajn fortojn. Sed la fortaj estas disigitaj. Antaŭkondiĉo al sukceso estas, sendube, unuigo de ĉiuj ekzistantaj fortoj. Sen unueco ni certe pereos. Ni urĝe bezonas novajn sloganojn: "For la izolitecon!"; "Transpasu la landlimojn!"; "En unueco estas forto!" k.t.p. Ni bezonas unuecon ne nur por formi premgrupon, sed kaj ĉefe, ĉar nia laboro povas inde kaj fruktoporte realiĝi sole sur neŭtrala, internacia fono. Nia forto kuŝas en internacieco. Sen internaciaj dimensioj Esperanto fariĝas simpla ludilo, ŝatokupo por kelkaj stranguloj. Ni lanĉu do la sloganon: "Internaciecon en la praktiko!"

KRUCO (Géza Kurucz, Nyíri u. 11, H-6500 Kecskemét, Hungario)

REZOLUCIO PRI EDUKADO AKCEPTITA DE LA KOMITATO DE UEA EN BERGENO, NORVEGIO.

LA KOMITATO

starigas komunan komisionon de UEA kaj ILEI por ellabori kaj realigi planon por aktiva partopreno en la Jaro de la Familio proklamita de UN por 1994, laŭ specifo en aparta rezolucio.

juĝas fruktodona la projekton 'Komunikado en la Eŭropa Komunumo 1992' iniciatita de UEA, ILEI kaj EEU kaj prezentita en ĵus aperinta kajero kaj *vokas* al ĉiu Landa Asocio en EK-landoj delegi kunlaborantojn kaj aktive partopreni.

konsterniĝas pro la tre limigitaj paŝoj de Landaj Asocioj kaj E-instancoj en orienta Eŭropo teni malfermaj siajn internaciajn rilatojn kaj *urĝas* ilin ne submetiĝi al la diserigaj tendencoj en siaj socioj kaj specife superi la transpagajn barojn, kiuj malhelpas interhomajn, kulturajn kaj edukajn kontaktojn. Koncerne ĉi-laste, ili strebu restarigi transpageblon por la lernejana revuo *Juna amiko*, por ke ĝi restu internacia kaj ne iĝu helpilo ekskluzive por 'riĉaj' lernantoj. La Komitato *vokas* al ILEI disponigi dumtempan financan apogon ĝis la Landaj Asocioj ellaboros la petitajn solvojn kaj *volas* aŭdi raporton pri tiuj solvoj en la venonta kunsido en Vieno.

notas la daŭran progreson de la elementaj kaj mezaj ekzamenoj de ILEI/UEA, kun 19 sesioj en 11 landoj, kun 135 sukcesintoj el 30 landoj el ĉiuj kontinentoj, *kontentas* aparte, ke la plej granda ekzamena sesio ĝis nun povis okazi en Rumanio, sed *malkontentas* pri la malrapida progreso pri la supera nivelo pro neinterkonsentita regularo.

ĝojas pro la apero de la komunik-stila lernolibro *Tendaraj tagoj* specife por 10-ĝis 14-jaruloj, *vokas* al instruistoj uzi ĝin kaj pli ĝenerale apliki modernajn komunikajn teknikojn en la instruado kaj *urĝas* la Ligon kiel eble plej baldaŭ aperigi la apogajn lernilojn kaj kompletigajn kajerojn kaj entrepreni similajn projektojn por aliaj aĝ-grupoj kaj kategorioj de lernantoj.

bondeziras al ILEI okaze de ĝia jubilea 25a konferenco, kaj *atentos* la rezoluciojn, kiujn ĝi akceptos. La Komitato *notas* kun kontento la signifan kreskon en la membronombro de la Ligo kaj *gratulas* al ĝia prezidanto pro efika gvido de la Ligo tra la lastaj kvin jaroj.

REZOLUCIO DE LA KOMITATO DE UEA pri la Jaro de Familio, 1994.


LA KOMITATO

aprobas la skribe prezentitan planon pri la engaĝiĝo de UEA kaj ILEI en la Internacia Jaro de Familio proklamita de UN por 1994, pli specife la okazigon de internacia seminario en Klagenfurt, Aŭstrio en junio 1994 sub la aŭspicio de Unesko kaj UN kun la provizore formulita temo "Internacia familio – utopio kaj realeco".

starigas komsionon de UEA kaj ILEI por evoluigi la seminarion kaj aliajn ligitajn iniciatojn en aliaj landoj. Fondo-membroj proponataj estas Z. Tiŝljar (Zagrebo, gvidanto), R. Corsetti (Romo), E. Schwarzer (Germanio), S. MacGill (Budapeŝto, ILEI), M. Maitzen (Vieno, kie troviĝas la kunordiga centro de UN por la Jaro), F. Lo Jacomo, B. Despiney (Parizo, sidejo de Unesko) kaj Amri Wandel (Israelo).

taskas la Estraron de UEA skribe submeti al Unesko la projekton kaj buĝeton en la necesa formo ĝis la fino de 1991, por ke la projekto estu oficiale agnoskita ankaŭ en la kadro de la Jardeko de Kulturo (1987-97), kaj al UN ĝin same prezenti por agnoskigo kadre la la Jaro de Familio. Ambaŭ petojn ĝi faru laŭ strukturo kaj informoj liveritaj de la komsiono ĝis septembro.

(La asembleo en Voss proponas al UEA aldoni nian novan vic-prezidanton kaj estraranon pri eksteraj rilatoj, prof. Glossop, al tiu komisiono.)



Klagenfurt troviĝas en sud-centra Aŭstrio vojkruce al Italio kaj Jugoslavio. Ne tro foras Hungario kaj Ĉeĥoslovakio. Sekve ĝi estas en kulture tre varia situo, kun lingvoj latinidaj, ĝermanaj, slavaj kaj finn-ugra parolataj en la proksimeco. Al ĝia internacieco kontribuas plie la centro de Unuiĝintaj Nacioj en Vieno. Ne hazarde, niaj lernejaj eksperimentoj okazis en ĉi tiu mond-parto. La relativa abundo de denaskaj esperantistoj kaj esperantaj familioj en la apudaj landoj favoras la realigon de ĉi tiu seminario ĉi tie en 1994. Ne tro fruas jam entrepreni la prepar-laboron!

ILEI LABORTABLE


Ĉi tiu rubriko ekde nun ricevos novan funkcion. Ĝis nun ĝi telegraf-stile peris etajn novaĵojn el nia interna agado. Ĝi plue faras tion sed nur en la vosto. La kapo kaj korpo fariĝos gvidilo por la laboro de la estraro kaj aktivaj kunlaborantoj, sed samtempe informilo kaj invitilo al ĉiuj legantoj internacie aktivi. La decidon, ke IPR estu ne nur faka sed ankaŭ agada organo pravigas la fakto, ke ĝi restas pli ekonomia maniero komuniki kun la membraro ol per cirkuleroj. Kiam necese, ni aldonos ekstrajn paĝojn, por ne senigi vin de la faka enhavo.

Celo por la nova periodo

ILEI estas esence volontula organizo, ĝi tiel restas eĉ post la konsento honorarii du komisiitojn. Sekve, por ion atingi, ni dependas je la bonvolo kaj sindediĉo de kerno el nia membraro, preta labori kontinue je internacia skalo. Por eĉ minimume kontentiga funkciado, tiu kerno devus konsisti el almenaŭ dudeko da personoj – preferinde tridek. Apud tiu kerno restas pli granda nombro de individuoj, pretaj kontribui foje al difinita projekto kaj kompreneble la sekcioj, agante unuavice je landa skalo. La kerno de nia kerno estas evidente nia sep-kapa tri-kontinenta estraro kaj niaj honorariitoj. Nia ĉefa mekanismo larĝigi la kernon estas la laborkomisionoj ekzistantaj (inkluzive la ekzamenan) kaj nove starigitaj. Do, unu post unu, ni prezentu ilin.

La estraro

Prezidanto: Stefan MacGill, Nov-zelandano vivanta en Hungario, diplomita instruisto de elementa lernejo, nun laboranta duontempe por komputila kompanio, duontempe pri Esperanto. Taskoj estas la planado kaj kunordigo, la eldona agado kaj rilatoj kun UEA kaj la movado. La kerno de la planado estas trijara laborplano pretigata, kune kun du detalaj laŭmonataj planoj, unu kun nur eternaj ĉiujaraj devoj, alia kun tio kaj aldone la taskoj por la kuranta jaro.



Vic-prezidanto: Prof. Ronald J. Glossop, usonano doktoriĝinta pri filozofio, profesoro kaj kunordiganto de programo pri pac-studoj en la Universitato de Suda Ilinojso en Edwardsville, verkis ĉ. 30 artikolojn kaj du librojn pri filozofio, paco kaj Esperanto. Taskoj estas la eksteraj rilatoj de la ligo, i.a. rilatoj kun UN en Nov-Jorko, kunordigo de nia partopreno en la Jaro

de Familio, proklamita de UN por 1994, reprezentiĝo en konferencoj kaj kunlaboro kun s-ro Symoens pri eŭropaj iniciatoj. La instruado de Esperanto al infanoj, agado inter skoltoj kaj interlernejaj kontaktoj estas krome preferataj terenoj.

Sekretario: Marija Beloševiĉ, juna kroatino kaj duon-profesia esperantisto, estante sekretario de Zagreba Esperanto-Ligo, krome komitatano de TEJO. Taskoj de sekretario estas protokolado kaj rekontrolo de plenumo de taskoj. Transpreninte krome la fakojn ekzamenoj, membraro kaj sekcioj, ŝi havos ampleksan taskaron. Dum ni klopodas krei 30-kapan kernon, Marija akceptis la konsiderindan defion kreskigi nian membro-nombron de la nuna 808 ĝis 1001, kaj aktive interveni en la deko da neadekvate funkciantaj sekcioj.

Kasisto: Bertil Andreasson, la veterano de nia estraro, apenaŭ bezonas prezenton. Liaj streboj estas larĝigi la gamon de niaj agadoj sed samtempe gardi nian modestan kapitalon. Tio unuflanke signifas bridi la elspezemon de la ceteraj estraranoj, sed aliflanke li firme subtenas la laŭpaŝan kaj prudentan profesiigon de nia laboro kaj la investadon en zorge elektitaj eldonaj projektoj. Li respondecas ekde nun ankaŭ pri la organizaj aspektoj de la konferencoj.

Vic-sekretario: Zhang Danchen, profesoro en la Universitato Huazhong, Wuhan, Ĉinio. Taskoj estas la azia agado kaj la disvastigo de niaj ekzamenoj en Ĉinio. Lia reelekto al la estraro estas plene meritata, surbaze eĉ sole de lia energia laboro ene de Ĉinio. Nia sekcio tie fariĝis unu el niaj plej grandaj, la nun okazantaj ekzamen-sesioj atestos je la skalo de ilia agado.

Estrarano pri instruado: Barcsay Zsuzsa, instruistino de la hungara, rusa kaj Esperanto, lerneja bibliotekistino, instruas metodikon en la E-fako de la Universitato ELTE, oficiala inspektoro/konsilanto de Esperanto en ŝtataj lernejoj. Taskoj estas servoj al instruistoj, i.a. starigo de interklasaj kontaktoj, superrigardo de instrumaterialo ktp. Apartan atenton ŝi dediĉos al la metodikaj seminarioj (IMS), restarigon de niaj intensivaj kursoj por instruistoj kaj klopodoj oficialigi ne nur la instruadon de Esperanto sed ankaŭ la trejnadon de instruistoj. Ŝi organizos konferencan gimnazion en la venonta konferenco.

Estrarano pri universitata agado: So Ĵinsu, juna universitata profesoro en Koreio, kun ligoj al pluraj universitatoj, kie Esperanto estas aktive instruata. Li krome faros la necesajn aranĝojn pretigi ILEI-konferencon en 1994.

Estraro kaj duono :

Tri el la antaŭaj estraranoj decidis ne rekandidatiĝi por la nova periodo. Tamen nia antaŭa prezidanto, s-ro Symoens, fariĝas gvidanto de laborkomisiono pri la eksteraj rilatoj en Eŭropo, specife por realigi la projekton 'Eŭropa komunumo 92' de UEA/ILEA/EEU. D-ro Dahlenburg restas membro de nia ekzamena komisiono. Malcolm Jones estas preta kunlabori kun ni estonte se por iu konkreta projekto tio povos utili. Sekve ni estas en la bela pozicio havi estraron kaj duono. Kaj tio en si mem estas preskaŭ duona kerno!

Novaj komisionoj:

Aldone al tiu menciita supre, la du ekzistantaj, kaj unu pri nia statuto, stariĝas du novaj. Adresojn vidu dorskovrile.

Gazetara servo: Tio celas arigi fakajn artikolojn, traduki ilin nacilingve kaj aperigi ilin en priedukaj aŭ prilingvaj gazetoj. Ĝi povus ankaŭ peri novaĵojn pri la Esperanta instruado kaj kunlaboros kun la telefaksa gazetara servo de UEA. Plenaj detaloj kaj kunlabor-alvoko sekvos baldaŭ! Gvidanto: Walter Klag, Aŭstrio.

Terminologio: Jen akuta problemo, alirenda de aktiva grupo de praktikantaj instruistoj kaj leksikografoj, sub gvido de Katalin Smidéliusz, Hungario.

Honorariitoj:

Kovács Márta estas konata al multaj membroj. Ŝi transprenas multajn el la redaktaj taskoj de IPR, kaj teknikajn kaj enhavajn. Ŝi krome verkas testojn kaj gvidilojn por niaj ekzamenoj, verkas la laborlibrojn por la serio 'Tendaraj tagoj' kaj prizorgas enpaĝigon de niaj eldonaĵoj.

Esperantina Mirska estas polino vivanta en Budapeŝto, instruinta dum la lastaj du jaroj en la eksperimenta klaso en Budaŭrs. Ŝi traktos ĝeneralan korespondan laboron, kompostadon por IPR, 'Juna amiko' kaj niaj libroj, pretigon de ekspoziciaj kaj instruaj materialoj kaj ekspedlaboron, i.a. pri 'Juna amiko', kiun ILEI surprenas laŭ interkonsento kun Hungara E-Asocio pri interŝanĝo de laborfortoj kontraŭ oficejaj faciligoj.

Ekzamenoj:

Demisias la prezidanto kaj sekretario de IEK, sed ambaŭ restas membroj. La nova sekretario estas s-ino Marie Hunninck, Bat. D 5, No 259, Lou Pous du Plan, F-84200 Carpentras, Francio, kiu laŭgrade transprenos la laboron. Eniras IEK la estraranino respondeca pri la ekzamenoj. IEK elektos sian propran novan prezidanton.

Dankoj:

La korajn dankojn esprimitajn en la konferenco al oficintoj en la antaŭa periodo ni reeĥas ĉi tie, same al tiuj, kiuj konsentis alpreni gvidon de nova komisiono. Bonvenon en la teamon!

La rubriko:

'ILEI labortable' aperos regule en IPR. Ĉi-foje ĝi skizis al vi nian kernon kaj la dividon de taskoj. En ĉiu estonta numero ĝi elstarigos po unu laborkampon aŭ projekton – ne per grandaj teoriaj eseoj, sed per listigo de praktikaj paŝoj kaj bezonoj, tiel ke ĉiu ajn leganto aŭ sekcio povu trovi manieron porti sian brikon, fari ion utilan, kaj eĉ kupli sin al la kerno.

De malantaŭ la labortablo salutas,

Stefan MacGill, prezidanto.

Esperanto-konkurso por lernejanoj

Pri spertoj post la unua jaro

Ĉiu scias, kiom gravas ke komencantoj estu ligitaj al la lingvo aŭ movado per pozitivaj impresoj, travivaĵoj. En lernejoj la konkursoj havas eksterordinaran signifon tiuterene. Sed, bedaŭrinde, ili ordinare estas okazigitaj malofte, kutime ĉiujare nur unufoje.

Por eviti la mankojn de tiaj tradiciaj konkursoj, en septembro de la pasinta jaro hungaraj instruistoj de Esperanto lanĉis novtipan konkurson. Nun, post unu jaro da spertoj, ĉiu kiu partoprenis en ĝi estas kontenta, kvankam la konkurso certe ne estas ankoraŭ perfekta.

En la konkurso povas partopreni nur lernejanoj (instruisto atestas per subskribo kaj stampo). Ekzistas *du kategorioj*: la unua por *bazlernejanoj* (aĝ - limo: 14 jaroj), la dua por *mezlernejanoj* (ĝis la aĝo de 19 jaroj). Ambaŭ kategorioj konsistas el *du grupoj*: *komencantoj* (lernantaj Esperanton dum malpli ol 2 jaroj), *progresantoj* (kiuj lernas ĝin pli ol 2 jarojn).

La konkursanoj ĉiumonate ricevas taskofolieton kun entute 7 ĝis 9 demandoj. Ĝusta respondo al ĉiuj demandoj ĉiam rezultigas 20 poentojn.

Ĉiu taskofolio estas redaktata kaj korektata de alia instruisto kaj sendata al la gimnazio Julia Bányai (en urbo Kecskemét). Ĝi estas la lernejo de la administra centro, kie ĉio estas prilaborata per komputilo, kie oni multobligas la taskofoliojn kaj de kie ĉiu lernejo partoprenanta en la konkurso rericevas sub granda koverto la korektitajn solvofoliojn, la novajn taskofoliojn kaj liston kun la nomoj vicigitaj laŭ la akiritaj poentoj. La nomoj de la lernantoj, okupantaj la unuajn tri lokojn ĉiufoje estas laŭtlegataj en la Esperanto-programo de Radio Bartók de Budapeŝto. Ĉio ĉi funkcias glate.

Kiajn avantaĝojn havas nia konkurso, en kiu ĉi-jare partoprenis 9 hungaraj lernejoj kun 241 lernantoj?

La taskofolioj estas redaktataj kaj korektataj de tiuj, kiuj instruas la lernantojn. Ili bone konas la lingvonivelon de siaj disĉiploj, kaj pro la fakto ke la redaktado iras de instruisto al instruisto, la konkurso konservas sian freŝecon kaj elanon.

La taskoj starigitaj antaŭ la geknaboj ne estas malfacilaj. Respondo al iu ajn demando neniam superas 10 vortojn. Malgraŭ tio la konkursanto devas konsulti vortaron, rekomenditan libron aŭ revuon, t.e. ili devigas la partoprenantojn al pli-malpli memstara laboro.

Per la tasketoj (meznombre 8) oni povas direkti la atenton de la lernantoj.

Tuja resendo de la korektitaj folioj igas la geknabojn noti bone tiklajn problemojn de nia lingvo. Krome kaj ĉefe, izolitaj lernejoj (instruistoj kaj lernantoj) ekhavas kontakton, kiu instigas al pli efika agado.

Unujara praktiko montris klare, ke partopreno en la konkurso multe vigligas la agadon de pluraj lernantoj. Intereso al la konkurso kreskus eĉ pli, se ĝi fariĝ us internacia ekde la nova lernojaro.

Mi esperas, ke pluraj instruistoj kiuj nun legas mian informaĵon, decidos favore kaj aliĝos al la konkurso. Al interesiĝantoj volonte sendas regularon kaj konsilaron la ĉeforganizanto:

s-ro KURUCZ Géza,
Hitel u. 10. fsz. 16.
H-6000 Kecskemét, Hungario.

SPECIMENA TASKFOLIO POR BAZLERNEJANOJ

1a jaro, n-ro 6 , 1a KATEGORIO Limdato: la 25a de marto 1991

1. **Konfuziĝis la literoj. Faru sencohavajn vortojn en ĉiu litergrupo!**
   REVIOR, INLGOV, ASKOL, TOMUMA (2 poentoj)
2. **Skribu per unu vorto!**
   lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo (2 poentoj)
3. **Ŝanĝu unu literon por veni al alia vorto.** Ekzemple: ankaŭ–antaŭ
   pomo, pensi, filo, ludi, poŝo, hotelo (3 poentoj)
4. **Kion vi diras al amiko, kiu iras dormi?** *(2 poentoj)*
5. **Kie loĝas la subaj bestoj?**
   sciuro, pasero, fiŝo, lumbriko, vulpo, hundo (3 poentoj)
6. **Kion faras** *astronomo, meteologo, profesoro? (3 poentoj)*
7. **Formu almenaŭ 6 vortojn el la radiko:** *frat- (3 poentoj)*
8. **Kiam kaj kie okazis la lasta hungarlanda deklamokonkurso en Esperanto?** *(2 poentoj)*

ATENTU LA MEZAJN PAĜOJN!

Se vi instruas Esperanton profesie aŭ amatore, reagu al nia enketilo. Vi samtempe helpos nin kompreni la skalon de instruado, kaj ankaŭ havigos al viaj lernantoj riĉajn kontakteblojn kun aliaj klasoj tra la mondo. Enketilo, kiu kontaktigas.

ILEI – LIGO, KIU EFEKTIVE LIGAS

Samtempe kaptu la okazon mendi je speciala dumtempa prezo la novan lernolibron por infanoj,

Tendaraj tagoj.

KONFERENCA PRELEGO:

Perkomputora Instruado de Esperanto

Amri Wandel, Israelo

En la moderna klasĉambro, la komputoro havas pli kaj pli gravan rolon. Aparte ekzistas multaj komputoraj programaroj specife celitaj al instruado de lingvoj. Pro ĝia regula strukturo kaj fonetika elparolo, Esperanto speciale taŭgas por perkomputora instruado. Generale la komputoraj metodoj havas kelkajn avantaĝojn kompare al ortodoksaj metodoj, nome ke la studento ricevas pli "individuan" traktadon kaj povas progresi en la propra ritmo. Komputora instruado ankaŭ ŝparas multan tempon por la instruisto, kiu povas dediĉi pli da tempo al pli gravaj kaj malpli teknikaj temoj (kiel instruado kaj klarigado anstataŭ ekzercado kaj kontrolado de hejmtaskoj kaj ekzamenoj). Aliflanke, ekzistas malavantaĝoj, kiel la "komputora barilo" (aŭ "maŝinofobio") kiun kelkaj studentoj povas havi, kaj la ne-persona sinteno (ekzemple, la studento ne povas libere diskuti kun la programo). La instruisto devas esti konscia al tiuj aspektoj, laŭnecese kombini "tradiciajn" kaj komputorajn metodojn, kaj superrigardi la individuajn studentojn por malkovri eventualajn problemojn.

Oni povas distingi kvar kategoriojn de komputoraj helpiloj por komputora lingvo-instruado:

a. Testiloj – komputorigitaj testoj por taksi la komencan nivelon kaj por grupigi la studentojn en apartajn nivelojn (ekzemple, se ne ĉiuj komencas de la sama nivelo), por taksi la progreson de tempo al tempo, kaj por la fina ekzameno. Tiaj programoj ofte kapablas aŭtomate kontroli la respondojn (kelkaj eĉ reĝisoras la notojn) kio ŝparas al la instruisto multan laboron, kaj pli grave, ili povas facile produkti diversajn statistikojn de specifaj eraroj aŭ de certaj temoj, kiu ebligas al la instruisto taksi la progreson de la klaso kaj diagnozi malfortajn punktojn. Aliflanke, ĝuste komputoraj ekzamenoj estas la plej verŝajnaj viktimoj de "maŝinfobio".

b. Ekzerciloj – plej variaj specoj de ekzercoj kiuj celas individuan laboron de la studentoj en la komputora laboratorio por ekzerci la materialon instruitan en la lecionoj. Komputoraj ekzercoj havas kelkajn avantaĝojn kompare al ortodoksaj (skribaj) hejmtaskoj: la studento sentas sin pli respondeca kaj motivigita kunlabori, la programo povas tuj informi pri la rezulto – ĉu gratuli por ĝusta respondo, aŭ bedaŭri kaj peti reprovon responde al malĝusta respondo.

c. Instruiloj – al tiu kategorio apartenas moduloj kiuj sendepende instruas novan materialon. Ili ofte estas kombinitaj kun ekzercado, kaj foje utiligas ankaŭ aŭdvidajn rimedojn, kiel grafikaĵojn kaj paroladon, ĉu komputora ĉu per aparta medio kiel sonbendo aŭ vidbendo.

ĉ. Komputoraj ludoj kaj aplikaj programoj – tiuj fakte estas certa speco de ekzerciloj, kiuj instigas uzadon de la lernita materialo en distra maniero, aŭ por alia utila celo. Ludante aŭ uzante la programojn la lernanto aŭ aplikas la lernitan meterialon aŭ uzas la lingvon ĝenerale .

La varieco de eblecoj estas efike demonstrita per pluraj lingvo-instruaj pakaĵoj kiujn mi adaptis al Esperanto kaj elprovis kun studentoj de la Esperanto-programo en San Francisko Ŝtata Universitato (SFSU). En la pakaĵo de SFSU la testila kategorio (a) estas demonstrita per ekzamenaro tri-nivela (enkonduka, fina baza kaj fina mezgrada), kiu utiligas la lingvo-instrupakaĵon "DASHER" (taŭga por IBM PC kaj kongruaj komputoroj). Ekzemple, la enkonduka ekzameno estis verkita laŭ modelo de skriba enkonduka ekzameno planita de Prof. Duncan Charters, kaj havas ses ĉapitrojn: "plenumu la mankantan vorton", baza vortaro, frazo-konstruado, demandoj kaj respondoj, tradukado kaj "respondu la demandon" (libera respondo). Ĉiuj krom la lasta estas aŭtomate kontrolataj kaj se oni provizas la liston de la studentoj, la programo tajpas resuman liston de notoj kaj de rezultoj en ĉiu ĉapitro.

La ekzercila kategorio (b) estas reprezentita per la potenca kaj uzanto-amikema pakaĵo "MACLANG", kiu, kiel aludas ĝia nomo, utiligas komputoron "Macintosh". Tiu pakaĵo estas pli fleksebla ol la pakaĵo "DASHER", kaj havas multe pli da ekzerco-specoj, interalie la ebleco inkludi grafikaĵojn kiel parto de la demando/ekzerco. Nuntempe ekzistas nur modela ekzercaro en Esperanto, kiu demonstras la variajn eblecojn. Plia avantaĝo de MACLANG estas ke ĝi kapablas "memori" la erarojn faritajn de la studentoj kaj poste liveri statistikon pri tio al la instruisto, kiu siaflanke povas diskuti en la klaso la plej oftajn erarojn. Alia trajto estas ke la instruisto povas modifi la ekzerco-programon tiel ke ĝi "konu" oftajn erarajn respondojn kaj donos taŭgan respondon. Ekzemple, en korelativa ekzerco, "kompletigu la jenan frazon: Paulo serĉis la knabinon k_____ li renkontis en la balo" – se la studento respondas la ĝustan respondon ("kiun") la programo respondas laŭdan respondon (arbitre elektita el listo modifebla de la instruisto) kiel "bonege", "jes!", "ĝuste!" ktp. Same se la studento eraras, la programo respondas bedaŭran respondon, kiel "provu denove" aŭ "bedaŭrinde ne". Aldone, la programo povas "rekoni', certajn oftajn erarajn respondojn kaj reagi specife al ili. Ekzemple, se la studento respondas "kion" la programo tajpos ekzemple "provu denove, notu ke temas pri persono". Se venos respondo "kiu" la programo povas respondi "preskaŭ tiel, sed memoru la akuzativon!"

La instrua kategorio estas reprezentata per kompleta Esperanto-kurso verkita de Mike Urban el Usono por la Macintosh. Ĝi bone utiligas ankaŭ la grafikajn kaj aŭdajn kapablojn de tiu komputoro, kaj ekzemple havas ekzercadon de prononcado kaj elparolo, uzante la parolsintezan kapablon. Kiel grafika ekzemplo oni povas mencii la bildon de oficejo kiu aperas sur la ekrano, kaj por ĉiu objekto kiun oni indikas per la "muso" (montrilo) la programo tajpas la esperantan nomon kaj elparolas ĝin.

La lasta kategorio estas reprezentata per la fama diskut-programo "ELIZA", kiu imitas psikiatron kaj kondukas dialogon kun psikoanaliza karaktero, en kiu la homa partnero "parolas" per la klavaro. Depende de la entajpaĵoj de la uzanto, la konversacio povas fariĝi tre sprita kaj amuza, tiel kuraĝigante la studentojn verki frazojn kaj uzi novajn vortojn. (La programo estis adaptita al Esperanto de la aŭtoro kaj ĝi haveblas sur 5,25 colaj moldiskoj por IBM PC (kaj kongruaj) personaj komputeroj kaj estas mendebla ankaŭ pere de UEA).



Jubileo de agad-plenaj jaroj

Okaze de la tria jubileo de sia fondiĝo la Esperanto-klubo de la Laborulara Kultur-domo de Ho Chi Mihn-urbo organizis kunvenon en julio 1991 kiun partoprenis krom funkciuloj kaj klubanoj raportisto de gazetoj kaj televid-stacioj. De post 1988 la klubo sukcesis regule eldoni 9 numerojn de du-lingva interna informilo kaj kunlabore kun la urba E-asocio eldoni ses numerojn de 'Vjetnamio' (trimonata ilustrita revuo de la Vjetnama Inform-agentejo). Plej interese, ĝi lernigis la internacian lingvon al 350 vjetnamoj kaj 25 kampuĉiaj studentoj. Lige kun tio, s-ino Tuyet Than, prezidanto de la E-Asocio de Ho Chi Minh-urbo (sur la foto) transdonas 12 atestojn pri lernado al finstudintaj studentoj. Dekstre staras la estro de la klubo, s-ro Ngo Chan Ly, kiu ankaŭ sendis la raporton.

Unu el la lastjaraj kampuĉiaj lernintoj diris: "Antaŭe mi scipovis nur la anglan lingvon. Sed dum mia restado ĉi tie mi havis okazon renkontiĝi kun esperantistoj. De tiam, mi scias, ke Esperanto estas ankaŭ alia interkomprenilo ne malpli grava. Ni, dek kampuĉiaj studentoj ricevis lecionojn kmer-lingve. Post nur kelkaj monatoj, ni povis iagrade posedi la lingvon kaj korespondi kun alilandanoj. Revenante al nia hejmlando, mi jam malfermis du Esperanto-kursojn por kampuĉianoj en februaro 1991 kun 50 lernantoj." Pluraj studentoj kaj profesoroj en Kampuĉio serioze interesiĝas.

KONFERENCA PRELEGO:

La ĵusa enkonduko de fremdlingva instruado en la elementajn lernejojn de Germanujo — ĉu nova ŝanco por Esperanto?

1. Ĉu entute enkonduki Esperanton en la lernejojn?

Kadre de la ĉiamaj diskutoj, kiu estas la plej promesa strategio, venkigi Esperanton, kiel konate ekzistas du ekstreme kontraŭaj sintenoj: La tiel nomata desuprismo asertas, ke oni unuarange devas konvinki la plej gravajn politikistojn, kiuj tiam per dekreto ordonas la enkondukon de Esperanto en ĉiujn vivsferojn. La demalsuprismo alvokas konvinki la popolamason, ĝis kiam plimulto demokrate decidas favore al Esperanto kaj komisias la politikistojn, zorgi pri la necesaj paŝoj. Ambaŭ strategioj laŭ mia opinio estas nerealaj, ĉar la desuprismo premisas idealan registaron, la demalsuprismo idealan popolon. Sed ambaŭ teorioj inkludas la praktikan sekvon, enkonduki Esperanton en la lernejojn, ĉu laŭ desupra dekreto, ĉu laŭ demokrata decido, ĉar nur tiel ja disvastiĝas ankaŭ la konoj de aliaj fremdaj lingvoj.

Kiu do esprimas sin kontraŭ la enkonduko de Esperanto en la lernejojn, tiu estas nek desuprismano nek demalsuprismano, tiu estas entute kontraŭ la tiel nomata fina venko de Esperanto.

2. Kelkaj rimarkigoj pri la kleriga sistemo en Germanujo

La suba rezonado bazas sin sur la kleriga sistemo de Germanujo. La principoj tamen certe estas facile transformeblaj al alilandaj sistemoj, des pli, ĉar almenaŭ la ŝtatoj de Eŭropa Komunaĵo adaptos ilin iom post iom. Unikaĵo estas eble, ke la kulturan kaj tial ankaŭ la kulturklerigan suverenecon en Germanujo posedas la federaciaj landoj. La plej alta tutŝtata instanco estas la Konferenco de la Kulturministroj. Celo de ĝia agado estas i.a. certigi, ke la atingitaj kleraj gradoj, kiujn donas la lernejoj kaj universitatoj, restas kompareblaj kaj do agnoskataj tutlande. Tamen la interkonsentita kadro lasas ankoraŭ sufiĉan spacon por propra regularo, ekzemple, kiujn kaj kiom da fremdaj lingvoj la lernejanoj povu aŭ devu eklerni.

En Germanujo ĉiuj infanoj vizitadas unue dum kvar jaroj la elementan lernejon, poste dum pliaj ses jaroj la bazan lernejon aŭ la mezan lernejon, aŭ dum naŭ jaroj la superan lernejon, la gimnazion. Necesas entute minimume dek jaroj da lernado, kiuj povas konduki al baza aŭ al meza kvalifiko (sendepende de la lerneja speco); la lastaj tri jaroj en la gimnazio kondukas al la supera kvalifiko, la abituro. Laste la tri lernejaj specoj por la klasoj kvina ĝis dek-tria povas ankaŭ esti kunigitaj en unu lernejo.

Laŭ interkonsento de la Konferenco de la Kulturministroj ĉiu Germana lernejano devas eklerni la Anglan lingvon. En la bazaj lernejoj oni instruas nur ĝin; en la mezaj lernejoj krome la Francan lingvon, en nordokcidenta Germa-

nujo ankaŭ la Nederlandan, almenaŭ pasive. En la gimnazio oni plej ofte rajtas elekti, per kiu fremda lingvo komenci en la kvina klaso: aŭ per la Angla aŭ per la Latina, esceptkaze (precipe en sudokcidenta Germanujo) ankaŭ per la Franca. Sed ĉiam la Angla lingvo devas esti minimume la dua fremda lingvo, kiun oni lernas. En la gimnazio oni rajtas elekti trian fremdan lingvon inter pluraj, krom la supre menciitaj ankaŭ la Hispanan, la Rusan, la Italan, tre malofte aliajn. Ekster tiuj ordinaraj fakoj ekzistas foje laborgrupoj pri certaj aliaj lingvoj, sed sen komparebla signifo.

3. La diskutoj pri la politiko de fremdlingva instruado

Diskuto pri la politiko de fremdlingva instruado okazadas ĉefe dum fakkunvenoj de filologoj kaj en ties revuoj. Okulfrapas, ke la lingvikistoj kaj lingvoinstruistoj unuanime avertas kontraŭ ekskluziva instruado de la Angla lingvo. Anstataŭe la koncernaj kompetentuloj postulis en la Dekreto de Homburg, ke la lernejoj ofertu pli da diversaj fremdaj lingvoj, prioritate la t.n. najbaran lingvon de trans la plej proksima limo, kaj komunikadan lingvon, kiu tamen estu unu el la t.n. "grandaj lingvoj", t.e. vaste parolataj.

Aliflanke la ŝtataj instancoj ne realigis tiujn postulojn de la fakuloj. En la jaro 1954a decidis la Konferenco de la Kultur- ministroj, ke Esperanto ne estu ordinara instrufako, sed nur permesata por laborgrupoj, kie ekzistas kapabla instruisto, kie permesas tion la lerneja gvidantaro kaj la gepatroj kaj kie troviĝas sufiĉe multaj lernejanoj, kiuj libervole volas lerni ĝin. Pli altan rangon ili ne volis doni al Esperanto, same ne al multaj aliaj lingvoj, tiel ke praktike la Angla lingvo ĝuas nekompareble privilegiitan rolon, krome – kvankam malpli – la Franca kaj la Latina. Tio estas tute kontraŭ la laŭdira celo de la fremdlingva instruado, ke la lernanto mergiĝu en alia kulturo ĝenerale, ĉar tiam oni devas redemandi: Kial nur en la Angla kulturo? La vero estas, ke Germanujo estas eksportdependa lando, kies komercistoj devas paroli la lingvojn de la klientoj, kaj tiuj parolas aŭ almenaŭ komprenas plej ofte la Anglan, aŭ la Francan aŭ la Hispanan. Pri kulturo ne temas. Sed, ĝuste tiun argumentadon la ministerioj uzis kontraŭ la enkonduko de Esperanto, ĉar ĝi laŭaserte ja ne havas kulturon.

4. La bezonoj de Eŭropo kaj ĝiaj influoj al la fremdlingva instruado

Lastatempe tiu situacio rimarkeble ŝanĝiĝis: pli kaj pli la oficialaj klerigaj instancoj konfesas la veron, ke la celo de fremdlingva instruado estas komunikada kompetenteco kaj ne tiom la intima konatiĝo kun alia kulturo. Tiun evoluon kaŭzas la kunkreskanta Eŭropo, en kiu oni ekatentas samtempe, ke, kaj malgraŭ ĉiuj klopodegoj la plej multaj civitanoj tamen ne sukcesis, lerni la Anglan lingvon, kaj komunikado en Eŭropo postulas vastan interkompreniĝon, por kiu nur unu nacia lingvo estas nek taŭga nek dezirinda. La "Europaische Zeitung" (Eŭropa gazeto), revuo de transpartia Eŭropon antaŭeniganta politika asocio, en sia marta eldono raportis la sintenon de la estro de la kultura sekcio de la Eŭropa Konsilio: "Buŝa interkompreniĝo per la ĉiutaga lingvo estas por Eŭropo pli grava, ol profundaj konoj de gramatiko

aŭ de la klasika literaturo." Mi ne forgesu, enplekti ĉi tie la anekdotan rimarkigon, ke tiu estro de la kultura sekcio, kaj plie, ankaŭ la nova ĉefredaktoro de la "Eŭropa gazeto" ambaŭ estas konvinkitaj Esperantistoj kaj membroj de Germana Esperanto-Asocio.

5. La planita enkonduko de fremdaj lingvoj en la elementajn lernejojn

Ĝis nun estis preskaŭ dogmo en la Germana kulturpolitiko, ke la klasoj de la elementa lernejo, do la 1a ĝis la 4a, ne havu instruadon en fremdaj lingvoj. Tiu dogmo ĉiam jam estis kontraŭdiro al la ĝenerale konsentita juĝo de la fakuloj, ke infanoj ĝuste dum tiuj jaroj plej facile lernas fremdajn lingvojn – se oni aplikas la ĝustan metodon de instruado. Estas klare, ke la nunaj metodoj, nome, per analizado enkonduki gramatikajn strukturojn kaj neglekti la kapablon de libera parolado, ne estas adekvataj.

Laŭ la propono de kelkaj federaciaj Germanaj landoj, kiujn sekvos certe ankaŭ la ceteraj, oni nun forigos tiun dogmon. Elirante el la fakto, ke en Germanaj klasoj ĉiam pli granda procentaĵo de la infanoj ne havas la Germanan lingvon kiel gepatran, la nova modovorto estas nun *ĉirkaŭa lingvo.* Tiu esprimo estas misgvida, ĉar oni celas ĝuste ne la ĉirkaŭan lingvon, t.e. la gepatra lingvo, sed oftan fremdan lingvon de la individua ĉirkaŭo de iu klaso aŭ lernejo. Alivorte klarigite: ofte iu urbeto aŭ iu urba kvartalo havas precipe grandan minoritaton de eksterlandanoj, ĉu azilpetantoj, ĉu enmigrintoj, kiuj parolas certan fremdan lingvon, kiun la Germanaj enloĝantoj do precipe ofte aŭdas en sia ĉirkaŭo.

Celo de la nova fremdlingva instruado en la elementa lernejo estas nun, konatigi la Germanajn infanojn kun tiu individua ĉirkaŭa lingvo, tiel ke ili pli bone interkompreniĝu kaj harmoniu kun siaj malgrandaj kamaradoj, kiuj ne denaske parolas la Germanan. Kadre de la instruado oni ankaŭ konatigu la infanojn kun la celoj de la Eŭropa Movado kaj traktu Eŭropajn temojn.

6. Ĝis nun konataj detaloj

La instruado estos deviga! La gepatroj kaj la lernejo decidu komune, kiun fremdan lingvon oni instruu en kiu klaso. Teorie povas regi granda diverseco, kiel postulite de la fakasocioj: la lingvoj povas varii ne nur laŭ urboj aŭ kvartaloj, sed eĉ laŭ klasoj, tiel ke unu klaso okupas sin kun la Turka lingvo, ĉar en ĝi estas multaj etaj Turkoj, dum alia klaso kun multaj el Sovet-Unio elmigrintoj elektas la Rusan.

Ĉiu instruado okazu kompreneble ne sisteme, sed ludece: helpe de rimoj kaj kantetoj, ŝercoj kaj ludoj, ktp. Ni bone konas tion, ĉar ĝuste tion ni ankaŭ rekomendas por la instruado de Esperanto al etuloj. Tamen estas granda diferenco inter nia celo rilate Esperanton kaj tiu de la nova fremdlingva instruado: Ne estas iu espero, ke la infanoj en la elementa lernejo vere lernas iun fremdan lingvon, dum ni senkompromise celas kaj povas celi peri veran komunikad-kapablecon.

En la unua klaso oni volas elspezi nur du horojn semajne, poste kvar horojn por la "ĉirkaŭa lingvo". Ŝajne, eĉ post la katastrofe magraj rezultoj el la instruado de la Angla, oni ankoraŭ daŭre revas pri tro alta nivelo. Mi menciu nur du ekzemplojn el Germanaj infanĝardenoj: estis kaj estas tre mode, ke la infanoj parkerigas la naskiĝtagan gratulan kanton "Happy birthday to you" en la Angla kaj la kanteton "Sur le pont d'Avignon" en la Franca, tute sen kompreni tion, kio por ili estas eble agrable sonanta vico de sonperloj. (Sed ĉar la gepatroj, kaj la vartistinoj, estas tiom fieraj, la infanoj brave papagas ĉion.)


Certe ekzistas tamen helpa efiko en la elementaj lernejoj, se tiulingvanoj vere estas kun la Germanaj infanoj, tiel ke tiuj havas eĥon kaj almenaŭ teorie povus vidi lernrezulton.

7. Necesa pluklerigo de instruistoj

Alia grava problemo de tiu nova lingvoinstruado estas, ke ja ne ekzistas instruistoj por ĝi. La kutimaj instruistoj de la elementaj lernejoj ne studis fremdajn lingvojn kaj ties didaktikon. Tial la kulturministerioj nun ofertas pluklerigajn kursojn por instruistoj en ĉiuj bezonataj fremdaj lingvoj. La instruistoj tamen ne tre aprezas tion. Oni devas memori, ke nuntempe la plej multaj instruistoj en Germanujo estas sufiĉe aĝaj, ĉar la registaro ne dungas junajn, kio dumlonge eblis pro la malkreskanta nombro de infanoj. Al instruistoj, kiuj bone instalis sin en sia lerneja ĉirkaŭo kaj kiujn ne plu atendas kariero, ne plaĉas iu ĝeno de la rutino. Mi konstatis en mia hejma regiono du ekzemplojn de lernejoj, kies estro vigle salutis la novajn eblojn de fremdlingva instruado en siaj lernejoj, kies instruistoj tamen rifuzis partopreni en ĝi, parte uzante niajn argumentojn, ke la celo ne estas atingebla, ke la ludeca instruado estas tre malfacila (kaj streĉa) kaj ke la malgrandaj Germanoj prefere uzu la tempon por lerni legi, skribi kaj eĉ paroli sian gepatran lingvon, kion multaj Germanaj lernejanoj ne plu sukcesas. Des pli oni silentu pri la akiro de fremdaj lingvoj! La plej forta esprimo, kiun mi aŭdis, estis: "La deviga instruado estas krimo kontraŭ tiuj, kiuj preskaŭ jam ne havas ŝancon, lerni sian gepatran lingvon."

8. Pliaj problemoj

Jam la registaro mem dekretis, ke tiuj lingvoj, kiujn la lernejanoj ĉiuokaze lernos en la postelementaj lernejoj, ne estu instruataj kiel la "ĉirkaŭaj lingvoj". Oni prave vidas la danĝeron, ke ruzaj kaj ambiciaj gepatroj vidas ŝancon, ke iliaj infanoj povas bone antaŭprepari sin por la sistema instruado de fremdaj lingvoj en la postaj klasoj, ensuĉante bazajn sciojn jam en la unuaj klasoj kaj tiel ĝuante avantaĝon kompare kun tiuj lernejanoj, kiuj en la kvina klaso devos komenci vere de nulo. Kontraŭ escepta frua instruado de la Angla protestis forte ankaŭ la instruistoj de la postelementaj lernejoj, premsonĝante de lernejanoj en la kvina klaso, kiuj dum la instruado de la Angla daŭre komentas: Tion mi jam scias, tiel mem perdante la intereson, dum la aliaj veraj komencantoj estas humiligataj kaj malentuziasmigataj.



En pluraj EK-landoj, la enkonduko de fremdlingva instruado en elementajn lernejon estas aktuala demando. Por ni ĝi same aktualu – niaj argumentoj, instruistoj kaj instruiloj estu pretaj.

Tamen tiurilata danĝera evoluo jam komenciĝis: mi legis en instruista fakrevuo, ke ĵus aperis la unua materialo por la instruado de fremda lingvo en la elementlernejaj klasoj; ni ne miru, por kiu lingvo ĝi estas: jes, la Angla. Ĉar, diras la aŭtoroj, la Angla estas intertempe la klasika "ĉirkaŭa lingvo", ĉar ĝi ĉiam pli ofte aperas en nia ĉiutaga ĉirkaŭo, sur etikedoj de varoj, en varbslogano j de la komerco, kompreneble en la porjunulara muziko kaj lastatempe eĉ sur afiŝoj pri la balotkampanjo por la Germana tutlanda parlamento.

9. Ĉu nova ŝanco por Esperanto?

Ĉu tiuj novaj ebloj donos novajn ŝancojn ankaŭ al Esperanto? Mi opinias, ke jes, kvankam Esperanto ne estas 'ĉirkaŭa lingvo' laŭ la origina difino. En neniu klaso de elementa lernejo troviĝas malgrandaj kamaradoj, kiuj havas Esperanton kiel gepatran lingvon. Sed ĉu Eŭropo ne ĉiam pli kunkreskas kaj formos nian pli vastan ĉirkaŭon? Jenaj objektivaj avantaĝoj favoras la instruadon de Esperanto en la elementaj lernejoj:

- Esperanto estas unike utila modelo de fremda lingvo entute, tial ideala bazo por posta lernado de aliaj fremdaj lingvoj;
- nur en Esperanto la pli inteligentaj infanoj (ankaŭ ne ĉiuj!) havas ŝancon, vere eklerni lingvon ĝis ioma parolkapablo;
- Esperanto estas pedagogie elstare utila lingvo, ĉar ĝi aŭtomate instruas al la infanoj, ke ĉiuj homoj estas komuna familio, en kiuj la familianoj devas lerni konatiĝi kaj renkontiĝi duonvoje unu al la alia.
- Esperanto havas Eŭropajn radikojn, natura bazo por montri, kiel ni kun komunaj kulturaj radikoj fakte povos kunkreski al supernacio kun komuna tegmenta kulturo.

Krome ankaŭ tiuj infanoj, kiuj eklernis Esperanton, en la kvina klaso estus veraj komencantoj de la Angla kiel la aliaj, kvankam ni ja scias, ke la lernado de Esperanto tamen donos ĝeneralan avantaĝon.

10. Kiel praktike aliri la enkondukon de Esperanto per tiuj novaj ebloj?

Ĉar la paragrafoj (laŭ miaj scioj) allasas ĉiujn lingvojn kaj nur malrekomendas la Anglan kaj la Francan, formale oni povus ekinstrui Esperanton, se inst-

ruistoj kaj gepatroj konsentas. La instruado nepre estu libervola, prefere por tre inteligentaj infanoj, kiuj ofte enuas en tiuj klasoj. (Dum la horoj, kiam ili eklernas Esperanton, la aliaj infanoj povas ĝui specialan trejnadon en tiuj fakoj, en kiuj ili bezonas subtenon.) Ekde la komenco pluraj lernejaj grupoj el diversaj landoj kun daŭra kontakto inter si lernu Esperanton samtempe. Komence oni interŝanĝu regule leterojn, poste vizitojn. Ni konas tiun agadon, kiu ja ankaŭ nun foje jam okazas.

La gepatroj volonte jesos tion, aŭdante, ke tamen la infanoj supozeble poste havos pli bonajn lernrezultojn pro la propedeŭtika efiko de Esperanto.

Problemo restos la instruistoj. Nepra antaŭkondiĉo estas ja, ke ekzistas instruisto, kiu emas kaj kapablas instrui. Plie, ĝenerale, kiel ni scias, la tuta afero, ĉu okazos Esperanto-instruado aŭ ne, kutime dependas nur de unu entuziasma kaj entreprenema instruisto. La Esperanto-movado sola ne povos eduki sufiĉe multajn el tiaj instruistoj. Ĝuste tial estas nun granda ŝanco en Germanujo, ke la ŝtato transprenos la edukadon de Esperanto-instruistoj, ĉar la ŝtato ja ĉiuokaze preparis sin al pluklerigado de instruistoj en aliaj kaj pliaj fremdaj lingvoj, kial tiam ne ankaŭ en Esperanto?

Ekzistas la unuaj indikoj, ke kelkaj politikistoj ne malvolonte vidas tiun eliron el la dilemo, ne nuligi la kontraŭ-Esperantan decidon de 1954, tamen laŭfakte revizii ĝin en la kadro de tiuj novaj ebloj. En Baden-Virtembergo lastatempe landa parlamentano de la Verdana Partio demandis al Rainer Heckhausen, vicprezidanto de Germana Esperanto-Asocio: "Kaj kion la kulturministroj ĝis nun respondis al viaj proponoj, enkonduki Esperanton en la lernejojn?" S-ro Heckhausen respondis: "Ke ili post 1954 ne gajnis novajn sciojn pri Esperanto." – "Tiu estas trafa formulo, kiu montras, kiom hontu ili." komentis la parlamentano: "Ni ekde nun uzu ĝin publike por premi ilin." Mi mem tamen supozas, ke ni Esperantistoj ankaŭ inter la politikistoj intertempe havas multe pli da simpatiantoj ol antaŭ jardekoj. Foje certe necesos premo, multe pli efikos seriozaj ekpaŝo kaj ekago, for de hobia sinokupo ĝis profesinivela laboro sur la tereno de politiko de fremdlingva instruado.

d-ro Rudolf Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a, D-W-4418 Nordwalde, Germanujo; tel. + +49 (2573)626 (vespere).

GraVe ⇨

Tendaraj tagoj


Ĉu viaj lernantoj estas inter 10- kaj 14-jaraj? Se jes, ILEI eldonis precize por ili novan lernolibron de Esperanto! Karlo, Adelo, Rikardo, Habibo, Aniko kaj aliaj junuloj enkondukos ilin en la lingvon kaj invitas ilin partopreni la Duan Internacian Esperanto-Tendaron. La desegnisto de *Juna amiko*, Pavel Rak, donas allogan aspekton al la verko, en kiu abundas dialogoj, komunikaj ekzercoj kaj rakontetoj. Verkis la lernolibron Stefan MacGill.

Lernantoj aliaĝaj povas uzi la verkon – plenkreskaj observantoj de tiu junulara mondo bonvenas. La libro prezentas abundon da komunik-postulaj situacioj, por ke lernantoj parolu Esperanton jam de la unua leciono. Superfluas diri, ke la lernolibro estas nur Esperanta. Kvankam komunika, ĝi havas klaran gramatikan strukturon.

Eldonita de ILEI, UEA kaj la Hungara Junulara Esperanto-Asocio, la unua kajero prezentas ĉirkaŭ trionon de la esenco de la lingvo en tridek unupaĝaj ĉapitretoj. La kajero mem havas 44 A4-formatajn paĝojn; fine de ĝi aperas gramatika resumo de ĉio prezentita, verkita en Esperanto komprenebla al lernantoj, kiuj studis nur la enhavon de la kajero mem. Plie estas resumaj dialogoj, rol-ludetoj, rimaĵoj, ekzameno kaj skemo de la aperonta dua kajero. Baldaŭ aperos gvidilo por instruistoj kaj poste laborlibro kaj son-kaseto.

Tendaraj tagoj estas mendebla de Universala Esperanto-Asocio, je 12,00gld. (triona rabato ekde 3 ekz.). Sekcioj, instruistoj kaj libroservoj povas dum limigita tempo mendi pli grandajn kvantojn de ILEI rekte per la apuda mendilo – minimuma mendo ĉe ILEI: 3 ekzempleroj. Loĝantoj en Hungario kaj najbaraj landoj turnu vin al la hungara ILEI-sekcio, Kovács Márta, Ady Endre u. 23-25/C, H-1221 Budapest, kiu vendas ĝin kontraŭ 120 forintoj (95 ft ekde 6 ekzempleroj).

Kajero unu





MENDILO

Sendu al: ILEI, Stefan MacGill, Esö u. 7 III, H-1034 Budapest, Hungario ĝis plejlaste la 31a de decembro 1991.

Mi mendas la lernolibron 'Tendaraj tagoj' (kajero unu):
NOMBRO SUMO

_____ Ekde 3 ekzempleroj, po 8 gld. (25 SEK) _____

_____ Ekde 13 ekzempleroj, po 6 gld. (20 SEK) _____

Bv.sendi al: _____

_____

Mi sendis la pagon al: _____

Subskribo:_____ Dato: _____

Kiel enkonduka oferto, ĉi tiuj prezoj inkluzivas la surfacajn sendokostojn. Ni tamen petas vin antaŭpagi la mendon kaj sendi kun la mendo pruvon pri la pago. Ni volas eviti fakturadon.

Pagojn sendu al:
1) Universala Esperanto-Asocio, Nw. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam. Pĉk: 378964 Nederlando; 12-2310-0 Ĝenevo, Svisio; pĝk. 318291-509 Koln BLZ 370 100 50). Por la interna konto de ILEI: ilek-a; aŭ
2) ILEI, Bertil Andreasson, Södra rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio; pĉk: 682117-7 Stokholmo.

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ

ILEI

Enketilo pri lerneja instruado de Esperanto
1991/92

Bonvolu resendi ĉi tiun demandilon al ILEI, Stefan MacGill, Esö u 7 III, H-1034 Budapest ĝis plej malfrue la 31a de decembro 1991. Se vi faros tion, ni aperigos la rezultojn jam en IPR 92/1, ankoraŭ dum la kuranta lerneja jaro. **Bonvolu skribi tre klare kaj respondi aparte por ĉiu klaso.**

Urbo: Lando:

Nomo de la lernejo:

Adreso de la ☐ lernejo/ ☐ instruisto:

Nomo de la instruisto:

Ĉu profesia instruisto? JES/NE Dungito de la lernejo? JES/NE

Kiom da lernantoj de la kurso? Kiomaĝaj?

Komenco de la kurso: Atendata daŭro

Kiom da studhoroj entute apartenas al la kurso?

Kiom da studhoroj okazas ĉiusemajne? (Indiku kaj akademiajn kaj horloĝajn horojn.)

TURNU!

Oficialeco de la kurso:

Ĉu la kurso okazas ene de oficialaj horoj? JES/NE

Ĉu ĝi estas plene oficiala lerneja stud-temo? JES/NE

Se ne, ĉu partopreno estas deviga post elekto? JES/NE

Aliaj klarigoj:

Ekzamenoj kaj kreditoj:

Ĉu plenumo de la kurso kondukas al iuspeca kredito en la lerneja sistemo?

Ĉu fine de la kurso okazas ekzameno? JES/NE

Se jes, kiu starigas aŭ rekonas tiun ekzamenon?

Lerniloj Kiujn lernolibrojn kaj materialon vi uzas? (Aŭtoroj, titoloj)

Internaciaj kontaktoj

Ĉu lernantoj jam korespondas internacie? JES/NE

Ĉu vi volas starigi korespondadon – klasan ☐ individuan ☐

Ĉu alispecan internacian kunlaboron aŭ helpon vi volas?

PREZIDANTA ALPAROLO AL LA KONFERENCO RESUME DE LA ANTAŬA DEĴORPERIODO:

Tri jaroj en la bilanco (1988-91)

Edward Symoens, Belgio

Estu bonvenaj, karaj gekolegoj, en tiu ĉi 25-jara, jubilea ILEI-konferenco, kiu estas grava i.a. pro la elekto de nova estraro, la modifo de la statutoj kaj kelkaj aliaj necesaj decidoj. Mi klopodos doni al vi superrigardon de nia pasinta deĵorperiodo, ekde 1988 ĝis nun.

Niaj pensoj kompreneble unue iras al tiuj kiuj intertempe definitive forlasis nin: nia antaŭa prezidanto, elstara lingvisto, pedagogo kaj profesoro, d-ro István Szerdahelyi kiu mortis en 1987 kaj la ĝenerala sekreterio, ankaŭ elstara instruistino kaj aŭtoro, s-ino Audrey Childs-Mee, kiu forlasis nin en 1990. Ilia iama aktiveco daŭre postefikas kaj inspiras nin. Ni neniam forgesos ilin.

La forfalo de tiuj du aktivuloj certe ne simpligis nian taskon, sed la estraro tamen klopodis, kun via helpo, fari kelkajn progresojn kaj realigi iniciatojn, kiujn mi provos komenti.

1. Instruado

a) *La internaciaj ekzamenoj* (elementa kaj meza nivelo) nun estas realo, laŭ tute nova koncepto, kiun vi trovas klarigita en la broŝuro „Internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI", aperinta en 1989. Ili estis organizitaj en deko da landoj, plej ofte dum kongresoj, konferencoj ktp. La protokoloj de 1989 kaj 1990 troviĝas en IPR/1 de 1990 kaj 1991. Ekde septembro ĉi-jare, ni okazigos tutlandan ekzamenadon en Belgio, kiu ne posedas propran landan sistemon. El tiu eksperimento ni faros konkludojn, eble utilaj al aliaj landoj.

Dum ĉi tiu konferenco ni esperis pritrakti la Superan Nivelon, sed tio bedaŭrinde ne sukcesos pro motivoj kiujn mi poste klarigos.

b) *La instrurajtiga kurso* kiun iniciatis kaj prizorgis ĝis nun s-ino Szanser el Pollando, kun la helpo de ILEI kaj de la Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds, anonciĝis trifoje en ĉi tiu loko en Svislando (1988-1990), sed pro malfacilaĵoj, internaj kaj eksteraj, la kurso ne okazos ĉi-jare, kaj verŝajne ne tuj reokazos en La Chaux-de-Fonds.


La Zamenhof-Centro en Bjalistoko (Pollando), sub la impulso de ĝia sekretario, Jarek Parzyszek, proponis organizi tiun kurson, sed dum la UK ni ricevis mesaĝon de li, ke pro diversaj obstakloj ĝi tamen ne okazos.

La materialo de tiu altnivela kurso, post multaj teknikaj kaj homaj malfacilaĵoj, verŝajne post kelkaj monatoj, aperos libroforme. Ni tamen urĝe bezonas alian kurson, pli tuj praktikan, pli simplan, por trejni neprofesiajn instruantojn al minimuma fakeco, kun konkretaj scioj kaj konsiloj. Ankaŭ libreton por profesiaj instruistoj, kiuj ne instruas lingvon, sed aliajn fakojn. Ili ja lernis la ĝeneralan sed ne la specifan lingvo-metodologion, kaj adaptitan al Esperanto. Ne eblas ĉie organizi fidindajn kursojn, do ni nepre bezonas korespondan kurson

por memlernado, kun la ebleco unufoje en la jaro, en iu centra loko, organizi rapidresuman kurseton, sekvotan de faka ekzameno. Ni esploru ĉiujn eblojn tiurilate. Kiel vi, ankaŭ mi deziras plej bonan trejnadon de la instruistaro sed laŭŝtupe.

c) Ligite al tiu trejnado de instruistoj, ni menciu la gravan signifon de la *Internaciaj Metodikaj Seminarioj* (IMS), kiuj diversloke okazis (naŭ ĝis nun) sub la impulso de s-ino BARCSAY Zsuzsa. Ankaŭ sur ĉi tiu kampo ni urĝe bezonas ĝisdatigitan, allogan libron pri la ĝenerala baza instrumetodologio kaj priskribo de la diversaj specifaj instrumetodoj por Esperanto, kun indiko kaj pritakso de la koncernaj disponeblaj lernolibroj kaj didaktika materialo. Pro la propra karaktero de la Internacia Lingvo, ni bezonas novajn ideojn, nuntempajn metodojn por interesi la lernantaron. Ĉu ni sufiĉe kalkulas je la specifaj lingvaj ecoj de Esperanto en la ellaborado de niaj metodoj? Ĉu ni ne tro estas influitaj de la instruado de la naciaj lingvoj? Ĉu la propedeŭtika karaktero de Esperanto sufiĉe evidentiĝas en la ellaboritaj metodoj? Novaj ideoj kaj aliroj, kreemo kaj originaleco estu la leitmotivoj de niaj metodologoj, ne nur por plibonigi la instruadon de Esperanto, sed ankaŭ por pruvi al neesperentistaj gekolegoj ke ekzistas en la Esperanto-movado memstara fakularo, kiu kontribuas al la progreso de la lingvo-instruado ĝenerale.

ĉ) *La lerniloj* meritas apartan atenton pro la rapidega evoluo de la aŭd-vidaj eblecoj, la uzo de komputiloj, de video-filmoj, de la radio kaj televizio. Tio tamen ne signifas, ke ni devas forĵeti ĉiujn tradiciajn lernolibrojn, sed ni ja devas ĝisdatigi, modernigi, allogigi, ilustri ilin, adapti ilin al specifaj celgrupoj. Afriko bezonas aliajn lernilojn ol Azio kaj Azio aliajn ol Eŭropo. Ekzistas pozitiva evoluo tiurilate. Ni ricevis plurajn tre taŭgajn manuskriptojn, kiuj meritas eldonon, sed mankas al ni mono, kaj UEA bedaŭrinde ne multe helpas nin sur tiu kampo.



Arĥitekto de la lastaj tri jaroj da intensa laboro – s-ro Edward Symoens nun pesas la atingojn.

Mi pensas i.a. pri la lernolibro de Emile Van Damme (Belgio), verkita kunlabore kun afrikanoj por afrikanoj; pri la libro de Paul Gubbins (Britio) kun multaj kaj tre variaj ekzercoj; pri la paroligaj kursoj de nia vicprezidanto Stefan MacGill. Ĵus aperis de li la unua kajero de nova, tre alloga modernstila lernolibro por junaj infanoj *Tendaraj Tagoj*, kiun apogos gvidilo por la instruistoj.

Ni ricevis manuskripton de valora anglalingva informlibro de John Ibbotson: *A justification for Esperanto in the curriculum* (Pravigo de Esperanto en la studprogramoj) kaj *Teaching Methods for Esperanto* (Instrumetodoj por Esperanto), per kiu li atingis universitatan titolon. Sed, kie trovi la monon por eldoni ĝin? Ne forgesu la nepre apogindan revueton *Juna Amiko*, kiun brile prizorgas Stefan MacGill. Li havos okazon diri iom pri siaj problemoj tiurilate.

Iu fakulo devus okupiĝi ekskluzive pri ĉi tiu ege grava kampo. Ne temas nur pri elementaj kursoj, sed precipe, eĉ prioritate pri daŭrigaj, perfektigaj kursoj, kiuj mankas. Hans Bakker, ekzemple, kiu tiom efike okupiĝas pri la Esperanto-instruado en Afriko, petegas tiajn kursojn, kaj eĉ bremsas la aperon de libroj por komencantoj, ĉar ekzistas tro da „eternaj komencantoj", kiuj i.a. pro manko de taŭga materialo, ne daŭrigas, do forgesas tion kion ili lernis. Mi promesis al li interveni ĉi tie kaj insisti, ke ILEI aparte interesiĝu pri tiu esenca problemo. Kritikan superrigardon de ĉio ekzistanta ĉi-kampe ni bezonas por trovi la ĝustan vojon estonte, kaj respondi al la veraj bezonoj.

d) Ni povas aldoni al la klasika instrumaterialo *la didaktikajn ludojn*, kiuj utile povas kompletigi la tradician instruadon, sed ankaŭ de ĉi tiuj mankas kritika kaj analiza superrigardo.

e) Ne eblas al multaj homoj en la mondo, pro plej diversaj kaŭzoj, ĉeesti lernejan kurson, sed kiuj ja ŝatus lerni la lingvon hejme. Por tiu granda kategorio, ni bezonas *modernan perkorespondan kurson*, sed ankaŭ pri tio ni ne klare scias kio ekzistas, nek la valoron de la disponeblaj kursoj.

2. Internacia Pedagogia Revuo (IPR)

Depost du jaroj aperas kvar numeroj anstataŭ tri. Ĝi estas kompostita en Budapeŝto, presita kaj forsendita en la Grafika Centro de Antverpeno (GCA). Ni povas fieri pri la valora enhavo de la lastaj jaroj, sed ne pri la aperreguleco. Ĉi tiu konstato ne estas kritiko, ĉar mi scias kiom da laboro la prizorgantoj faras ekster la redaktado de la revuo. Ni tamen devas serĉi adekvatan solvon, ĉar IPR estas la sola transnacia ligilo inter la membroj. La redaktoro de IPR, ERTL István, vojaĝas multe, estas diversmaniere tre okupata kaj estas kandidato pri la redaktoreco de la UEA-revuo, *Esperanto*.

Ni sendas IPR duvoje: pakaĵe al la sekciestroj kiuj petas tion, aŭ individue al la abonantoj. Tio signifas, ke *por ĉiu numero* la Grafika Centro bezonas ĝisdatigitajn listojn de ĉiuj adresitoj, kio ne ĉiam sufiĉe akurate okazas.

Konsilindus disponi pri redakcia komitato, ĉar ne estas normale ke unu sola persono prijuĝu ĉiujn manuskriptojn. Pro praktikaj motivoj tiu komitato estu en la sama urbo aŭ regiono de la redaktoro.

3. Fondaĵo Szerdahelyi

Fondita en 1989, ĝi komence havis kuraĝigan sukceson, sed tio ne daŭris en la lastaj monatoj. Ĝis nun, ĝi enspezis 16.000 guldenojn. Mi rememorigas la celojn de la fondaĵo:

– realigi diversajn eldonaĵojn;
– organizi instrurajtigajn kursojn en diversaj lokoj kaj kontinentoj;
– partopreni en fakaj kolokvoj, kongresoj ktp.;
– organizado de vasta kaj konstanta informkampanjo.

La listo ne estas limigita.

4. Eldonaĵoj

Ĝis nun, la eldona aktiveco estis limigita al kelkaj broŝuroj: la Internaciaj Ekzamenoj kaj la traduko en la francan kaj la anglan de mia libreto pri la socipolitika, pedagogia kaj kultura valoroj de Esperanto. Lastmomente mi ricevis el Brazilo proponon de s-ro Alres Sabinho traduki ĝin en la portugalan.

Ĵus aperis, kaj nun estas havebla, la unua kajero de nova situaci-komunika lernolibro *Tendaraj Tagoj*, mi jam menciis ĝin.

La manuskripto de mag. Irena Szanser: *Glotodidaktikaj kaj specifaj aspektoj de Esperanto-instruado* kaj *Elektitaj problemoj de psikologio por lingvo-instruantoj* nun estas preta kaj estos eldonita en unu volumo.

Mi aludis la neceson eldoni multajn aliajn librojn, i.a. pri ĝenerala kaj speciala metodologio, pri la konkretaj aspektoj de Esperanto-instruado, ktp. En la sama kunteksto, ILEI aŭspicias la laboron de Lawrence Mee rilate al *Interetna Vortaro de Ordinara Esperanto*, vortaro por lernantoj.

Por realigi tiujn projektojn, ni povas:

– krei propran profesie funkciantan eldonan fakon, sed kie trovi la komencan kapitalon kaj la monon por pagi la deĵorantojn?
– interkonsenti kun ekzistantaj eldonistoj, sed por fari tion, ni pli bone devas koni ilin;
– eldoni en la plej malmultekostaj landoj, kiel ekz. Ĉinio k.a.

ILEI bezonas kompetentan fakulon pri eldonado, kiu estus komisiita por sisteme esplori ĉiujn eblecojn, kompari la prezindikojn, ekzameni la kondiĉojn kaj serĉi financajn rimedojn. Pluraj komisiitaj fakuloj estu je la dispono de ILEI por prijuĝi la manuskriptojn laŭ ĉies kompetenteco, kaj serĉi verkistojn por deziratai verkoj, eventuale en la formo de publika konkurso. Kial ne?

5. Kunlaboro kun aliaj asocioj aŭ institutoj

ILEI ne estas kaj ne povas esti izolita asocio. Jam estas longa tradicio ke ĝi kunlaboru kun aliaj organizoj. Prof. Szerdahelyi multe insistis pri tiu neceso. Tio ne signifas ke ĉiuj interrilatoj estas same viglaj kaj regulaj, sed ili ekzistas; ni pli ofte devas apelacii al la ekzistantaj kontakteblecoj. Jen la nuna situacio:

Universala Esperanto-Asocio (UEA)

ILEI pasintjare aliĝis kiel Faka Asocio pri Instruado al UEA. La ekzistaj rilatoj estas bonaj, sed ne sufiĉe glataj. UEA ekz. devas fidi la opinion de faka asocio rilate fakajn aferojn (i.a. pri lernolibroj) kaj ĝi ankaŭ devas klopodi reagi pli rapide al por ni urĝaj demandoj kiel ekz. la dosiero „supera nivelo de la Internaciaj Ekzamenoj" kiun ni lasis tie la 20-an de februaro, kaj ĝis nun ni ne rericevis... pro tio ne eblis al ni trakti ĝin dum ĉi tiu konferenco. Ciujare, ILEI prezentas rezolucion al la Komitato de UEA enhavanta financan disponigon por eduka laboro; ILEI estas reprezentata kiel observanto en la estraro de UEA kaj ricevas ĉiujn oficialajn dokumentojn, raportojn, ktp.

Internacia Esperanto-Instituto (IEI) en Hago, Nederlando.

Kun ĉi tiu aktiva kaj bone gvidata instituto, ILEI subskribis ĉi-jare kunlaborkontrakton. Komuna projekto atendas realigon: video-filmo de internacia Esperanto-kurso, projekciebla en la televizio pri kio ekzistas riĉa dosiero, kaj pri kiu s-ino Horst-Kolinska prelegos morgaŭ.

Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) en San Marino.

Jam en 1988, ILEI subskribis interkonsenton kun AIS. Kiel asocio, ILEI ne multon faris ĉi-rilate, sed ekzistas multaj individuaj kontaktoj de ILEI-anoj kun AIS. Ĝi restas tre subteninda entrepreno, en kiu ILEI certe povus ludi rolon, ekz. por fari la petitan lingvo-kompren-teston, por partoprenantaj ne-esperantistoj.

Kultura Centro Esperantista (KCE) en La Chaux-de-Fonds, Svislando.

Dum pluraj jaroj, ni havis apartajn kaj bonegajn rilatojn kun KCE, ĉar tie okazis la instrurajtigaj kursoj de s-ino Szanser kaj ankaŭ internaciaj ekzamenoj. La Centro, pro diversaj kialoj, i.a. financaj, provizore malpliigis siajn multnombrajn aktivecojn, sed ĝi restas ege grava, i.a. pro la tie ekzistanta urba dokumentejo pri Esperanto.

La Esperanto-Fako ĉe la Universitato Eötvös Loránd en Budapeŝto.

Delonge, kiam prof. Szerdahelyi ankoraŭ gvidis tiun fakon, ekzistas bonaj rilatoj kun ILEI. La nuna gvidantino, KOUTNY Ilona, deziras iom oficialigi la rilatojn. Interkonsento verŝajne baldaŭ estos subskribita pri la jenaj kunlaboreblecoj:

– reciproka subteno en Esperanto-forumoj kaj pedagogiaj medioj;
– harmoniigo de niaj formado kaj ekzamen-postuloj: tio povas okazi en la supera nivelo de ILEI-ekzamenoj, kiuj proksimu al la universitata nivelo;
– rekono de diplomoj kaj kursoj en difinota senco;
– spert- kaj materialinterŝanĝo (ekz. ricevo de IPR en Eötvös Universitato, konsulto kun ĝiaj fakuloj; ILEI ricevas la studplanojn de la Universitato por konsidero; reprezentanto de ELTE en ILEI-konferencoj);
– eventuala financa helpo tra la Fondaĵo Szerdahelyi;
– kunlaboro en eldonaĵoj.

Infanoj ĉirkaŭ la mondo, en San Diego, Usono.

ILEI estas en kontakto kun tiu asocio, kies celoj povas utili al Esperanto-instruistoj tra la mondo, nome:

– enkonduki Esperanton al infanoj en multaj landoj kaj helpi ilin interkomuniki kaj lerni pri infanoj en aliaj landoj;
– interŝanĝi sugestojn, ludojn kaj kantojn kun instruistoj de Esperanto, kaj proponi al ili malmutekostajn aŭ senkostajn instruajn materialojn. (ekz. kasetojn)

Kun la *Geonkloj esperantsitaj* (Britio) kaj la *Koresponda Servo Mondskala* (Francio) la kontaktoj povus esti pli intensaj, sed tio estas malpli la afero de la estraro ol de la individuaj membroj, la kursanoj, la Esperanto-grupoj, ĉar ili povus respondi al la ofte aŭdita demando: kion fari post la elementa kurso? Kiel kontakti esperantistojn en aliaj landoj? IPR povus regule atentigi pri tio.

Ekster la rilatoj kun Esperanto-organizoj, ekzistas aliaj kun neesperantistoj, ekzemple kun *UNESCO*, kie nia reprezentanto, François Lo Jacomo partoprenas en kunsidoj de la neregistaraj asocioj. Ni ricevas multajn interesajn

dokumentojn, revuojn, oficialajn paroladojn. Ni tamen povus fari pli kaj surbaze de niaj bonaj rilatoj kun la Centra Sidejo de UNESCO en Parizo, klopodi starigi kontaktojn kun la naciaj UNESCO-sekcioj en la unuopaj landoj.

Monda Konferenco por Talentaj kaj Naturdotitaj Infanoj.

ILEI kun sukceso peradis inter prof. Glossop el Usono kaj la Nederlanda fondaĵo „Esperanto ĉe la Instruado" por ke ni estu reprezentataj en tiu internacie prestiĝa konferenco en Hago, kiu bedaŭrinde okazis samtempe kun la UK en Bergeno. La rezulto de la nelacigeblaj kaj longdaŭraj intervenoj de prof. Glossop, de miaj propraj leteroj al la organizantoj, sed precipe de niaj nederlandaj kolegoj, sinjorino van Geffen kaj Erasmus, estas pozitiva: deko da Esperanto-parolantaj infanoj kaj kvin plenkreskuloj el Hungario ĉeestos la Konferencon kaj pruvos ke Esperanto funkcias! Prof. Glossop havos la okazon mem raporti pri tiu evento.

Ampleksa informkampanjo en la Eŭropa Komunumo.

Nuntempe, sub la aŭspicio de UEA kaj ILEI, sinjoroj Erasmus, Maertens, Cwik kaj mi mem preparas ampleksan informkampanjon ĉe gvidaj instancoj de la Eŭropa Komunumo, ĉar tie, pli ol alie, ekzistas unika ŝanco por Esperanto pruvi sian ekziston kaj utilon. Ĵus aperis enkonduka broŝuro pri la eŭropa lingva problemo kaj pri la rolo kiun Esperanto povus ludi. Pro tio, ankaŭ mi verkis libreton pri la propedeŭtika valoro de Esperanto (50 p.) kun tre ampleksa bibliografio, kun al Esperanto favoraj tekstoj de la Ligo de Nacioj kaj superrigardo de ĉiuj faritaj eksperimentoj. La libreto aperos ĉe UEA kaj estos tradukata en ĉiujn oficialajn lingvojn de la Eŭropa Komunumo. Ĝi jam aperis en la itala lingvo en revuo *L'Esperanto* de la Itala Esperanto-Federacio (n-oj 8/9 – 1990.) Aperos alia broŝuro de Gregoire Maertens pri la financaj aspektoj de la plurlingveco en Eŭropo. En la enkonduka verko troviĝas priskribo de nia planita agadmetodo.

Eŭropa Esperanto-Centro en Bruselo

Mi ricevis peton de la Ŝtata altlernejo Erasmus por tradukistoj kaj interpretistoj en Bruselo, organizi tie oficialan Esperanto-kurson kaj eĉ fondi en la sino de la lernejo centron, kun biblioteko, dokumentejo, informejo kadre de la rapidega politika, ekonomia kaj kultura evoluo en Eŭropo. Kun kelkaj kunlaborantoj el Bruselo kaj la Eŭropa Komunumo mem, ni nun klopodas realigi ion konkretan, kaj centrigi ĉiujn Esperanto-aranĝojn en Bruselo en tiu lernejo. Nepre apoginda iniciato, en kiu ILEI povas ludi gravan, eĉ esencan rolon.

Terminaroj

Ĝis nun mi nur iom preparis la terenon por realigi nepre bezonatan *pedagogian terminaron* per multaj interrilatoj kaj kontaktoj kun TEC (Terminologia Esperanto-Centro) de UEA, INFOTERM (Internacia informada centro pri terminologio) kaj precipe TERMONET (Internacia Reto de Terminologio) en Aŭstrio. Mi arigis informojn kaj bibliografiajn donitaĵojn, sed mi ne kompetentas por efektivigi la laboron. Mi esperas ke vi ĉi-semajne aprobos la proponon fondi specialan terminologio-komisionon. Konsentas gvidi ĝin profesiulino, SMIDÉLIUSZ Katalin el Hungario, kiu jam kun sukceso kontaktis eblajn kunlaborantojn.

Por pruvi, ke ĉie estiĝas neatenditaj iniciatoj, mi mencias rilate al terminologia laboro, en kiu mi nome de ILEI nur peradis kaj serĉis kunlaborantojn:

- la jam realaigitan *Orgena Vortaro* (en 11 lingvoj), Belgio;
- la nun komencitan esperantigon de *Socia Enciklopedio*, fare de loka grupo en Namuro de la Belga Laborista Sindikato. El la lasta letero, mi citas: „Pri la tuto, ni vidos ĝustatempe, ĉu ne bonege estus, ke aŭtoritatoj (ĉefe flanke de ILEI!) bonvolus kontroli la unuajn tradukitaĵojn."
- Oni ankaŭ antaŭ nelonge petis min serĉi Esperanto-fakulon por kunlabori en nova plurlingva terminaro pri naturprotektado, pejzaĝo-arto, k.s.

Ĉio tio ne estas rekta koncerno de ILEI, sed ja nerekta, ĉar ne nur la ĝenerala, sed ankaŭ la faka terminologio koncernas ILEI, kiu en iu momento devos okupiĝi pri faka instruado sur plej diversaj kampoj.

Naciaj trajtoj kaj influo en Esperanto

En Hanabanilla, ni aŭdis pasintjare kelkajn intervenojn rilate al ĉi tiu temo, kiu por la estonta evoluo de la Internacia Lingvo estas esenca, ĉar tro da naciaj influoj povus endanĝerigi la internaciecan, do komprenigan karakteron de Esperanto. Mi ĉi-jare kolektis i.a. ĉe d-ro Blanke, plurajn bibliografiajn donitaĵojn, kiujn ni nun sisteme devas esplori, analizi kaj konigi pere de IPR al la internacia instruistaro. Mi apelacias al vi ĉiuj kunlabori en ĉi tiu grava esploro. Mi provizore kolektos la novajn informojn, sed samtempe petas ke interesita lingvisto reprenu tiun taskon.

Kelkaj aliaj inicatoj

- Luis Alberto de Oliveira Coelho el Brazilo intencas okazigi en Paraiba do Sul pedagogian eksperimenton pri la propedeŭtika valoro de Esperanto. Mi sendis al li informmaterialon kaj kompletan bibliografion.
- Antonio Alonso Nuñez iniciatis projekton pri Internaciaj Preuniversitataj Somerkursoj en Esperanto ĉe la Instituto por Lingvoj de la Universitato de Santiago de Compostella en Hispanio ekde 1993. Li mem havos la okazon klarigi al vi pri kio vere temas.

6. Administraj taskoj kaj problemoj

a) Malforto de ILEI estas la manko de *permanenta sekrateriejo* en fiksa loko, kiu povus transpreni la ĉiutagajn administrajn taskojn for de la estraranoj, kie troviĝus la jam impona arkivo de ILEI, kie ankaŭ estus internacia dokumentejo pri lingvaj problemoj kaj pedagogia biblioteko. Mi jam kontaktis plurajn ekzistantajn Esperanto-centrojn, kie ni eventuale povus instali tiun sekretariejon, sed pro manko de financaj rimedoj, ni ne sukcesis realigi tiun esencan projekton. Dum la lasta jaro, en Budapeŝto, Stefan MacGill faris paŝon en la bonan direkton. Por helpi lin en la administrado de la Internaciaj Ekzamenoj, la kompostado de IPR ktp, li altiris la kunlaboron de kelkaj personoj, kiuj kontraŭ modesta financa kompenso, plenumas tiujn taskojn.

b) *Gvidilo por sekciestroj*: Antaŭ du jaroj, la estraro proponis dokumenton, en kiu la taskoj de bone funkcianta sekcio estas priskribitaj. Estus bone, se post ĝisdatigo, tiu gvidilo estu sendita al ĉiuj novaj sekciestroj; ĝi povas esti rimedo certigi la necesan kontinuecon en nia agado.

c) *Gvidilo kaj regularo por fondi novajn sekciojn*: En ĉi tiu dokumento, ni klopodas unuecigi la proceduron por fondi novan sekcion, konforme al la statuto.

ĉ) *Reprezentantoj*: En landoj, kie starigo de sekcio ne eblas, ni iniciatis la akcepton de oficialaj reprezentantoj, kiuj klopodas disvastigi Esperanton, organizi kursojn, kaj prepari la terenon por posta fondo de sekcio. Ili ricevas ĉiujn dokumentojn kaj informojn de ILEI.

d) *Labordokumentoj*: En 1985, ni iniciatis, kiel bazon de diskutoj, la uzon de labordokumentoj, kiuj havas la avantaĝon konkretigi ofte abstraktajn ideojn aŭ proponojn. Ankaŭ ili estas elementoj por certigi la kontinuecon en nia laboro, ĉar eblas plurfoje post maturiĝo, prezenti ilin por nova diskuto.

e) *Statuto*: La sperto de la lastaj jaroj kondukis nin al funda rekonsidero de niaj statuto kaj regularo. Grandan laboron faris tiurilate nia kolego Oene Hoekstra el Nederlando, kiun mi nun publike dankas por lia persistema okupiĝo kaj preparo de tiu dosiero. Ankaŭ Stefan MacGill meritas tiurilate nian apartan dankon. Mi esperas ke dum la nuna konferenco, post funda diskutado, la konferenco akceptos la novajn statuton kaj regularon.

f) *Statistikoj*: Estas normale, ke la estraro de ILEI ekzakte sciu kie okazas Esperanto-kursoj, je kiu nivelo, kun kiom da lernantoj, ktp. Vi ĉiuj konas la altvaloran laboraĵon de s-ro Germain Pirlot el Belgio, kiu dum multaj jaroj prizorgis kaj eldonis proprakoste la statistikojn pri Universitata Esperanto-instruado. Pasintjare, pro ne-reago de tro da docentoj, li anoncis la finon de sia laboro. Tio feliĉe provokis psikologian ŝokon kaj li ricevis tiom da insistaj kaj kuraĝigaj petoj ke li konsentas daŭrigi sian laboron. Ni alvokas ĉi-foje je pli rapida kaj akurata reago al liaj demandiloj. ILEI mem faris ekde 1988 pere de *Juna amiko* kaj IPR enketon pri la elementaj kaj mezaj lernejoj, bedaŭrinde ankaŭ kun nur modera sukceso. Karaj gekolegoj, vi komprenu ke sen la aktiva kaj akurata kunlaboro de la ĉie tra la mondo dissemitaj membroj la estraro ne povas fari multon. Ne estas ILEI la estraro sed la membraro. Precizaj, fidindaj statistikoj estas gravaj por ellabori realisman laborplanon kaj fiksi strategion, uzeblajn en nia informa laboro.

g) *Historio de ILEI*: Ni estis esperintaj prezenti al vi almenaŭ skizon de la historio de ILEI okaze de ĉi tiu 25-a ILEI Konferenco, sed tion ni bedaŭrinde ne sukcesis fari, kaj nia alvoko el 1988 tiurilate restis sen respondo. Dum la 20-a Konferenco en Louvain-la Neuve (Belgio) en 1986, KOVÁCS Márta el Budapeŝto prezentis unuan skizon pri la historio de la lastaj 10 jaroj de ILEI/IPR. Tio eble estu elirvojo por pli ampleksa kaj kompleta laboraĵo. Ne estos facile pro la faktoj, ke la arkivoj de ILEI troviĝas en plej diversaj lokoj. La unua paŝo do estas: arigi, kunigi la arkivojn en unu loko, sed kie? Tio estas ligita al la bezonata Centra Oficejo de ILEI. Mi lastmomente eksciis de s-ino Dazzini ke plej multaj arkivaĵoj nun troviĝas en Massa (Italio). Ĉu ni trovos iun por trastudi ilin?

ĝ) *Memorando por organizi ILEI-Konferencon*: En 1987, mi proponis al la estraro memorandon por organizi niajn konferencojn, kiu jam plurfoje pruvis sian utilecon: kion fari antaŭ, dum kaj post la konferenco; kiam komenci, ktp.

Estus tre utile, se post eventuala reverkado, ĉiuj gvidiloj/memorandoj/konsililoj estus kunigitaj en unu broŝuro. Oni povus aldoni al ĉi tiu administra parto duan parton: kiel organizi ekzamenon, kiel organizi kurson ktp.; do pli pedagogie-orientita parto. La tuto estus praktika manlibro por ILEI-aktivuloj.

h) *Laborplano 1988–1991*: Post elekto de la nova estraro en Kerkrade, 1988, ni ellaboris precizan planon por tri jaroj. Mi jam citis plej multajn punktojn el ĝi, sed estos la tasko de la nova, morgaŭ elektota estraro fari la ĝustan bilancon kaj surbaze de tio ellabori novan programon.

* * *

Estas tempo, veni al konkludoj. Kiel vi konstatas, la estraro dum la pasinta periodo certe ne dormis, ĉar por trakti ĉiujn cititajn aferojn necesis interŝanĝi centojn da korespondaĵoj, verki raportojn, diskuti kaj cerbumadi.

Ĉu ni estu kontentaj pri la farita laboro? Jes kaj ne. Jes, ĉar la estraro atingis kelkajn konkretajn rezultojn kaj ni serioze preparis la terenon por la daŭrigo de nia komuna strebado. Ne, ĉar tro da problemoj restas nesolvitaj; ne, ĉar ni ne sufiĉe povis fari por diskonigi Esperanton ekster nia propra asocio.

Se ni, t.e. ĉiuj esperantistoj, konsciaj kaj motivitaj, ĉiuj Esperanto-organizoj ne sukcesas apliki aŭ aplikigi la Internacian Lingvon en la ĉiutaga socio, kultura, ekonomia kaj politika vivo, ni ne estu kontentaj.

Esperanto daŭre restas tro enĉambra afero, ni ne kreas sufiĉe da aplikeblecoj, kaj pro tio multaj lernintoj de la lingvo ne plu uzas ĝin post la kurso, do forgesas ĝin. Mi konfirmas kion mi jam ofte diris: Esperanto estas ligita al ĉiuj aspektoj de la homa vivo, kaj la sukceso de la Esperanto-instruado dependas de multaj faktoroj:

* de la kvalito kaj la motiviteco de la instruistoj kaj lernantoj;
* de la preteco de la aŭtoritatoj;
* de la kvalito de la lernmaterialo;
* de la uzitaj metodoj, adaptitaj al la celgrupoj; k.a.

Tiu varieco retroviĝas en la multaj aspektoj de nia pasinta agado. Ĝenerale mankas tamen al Esperanto prestiĝo por sukcesi. Prestiĝo laŭ PIV estas „imponeco, influo, akirita per antaŭaj agoj, atingitaj rezultoj, ks." Per la fakeco, la seriozeco de nia agado ni eventuale povos impresi la neesperantistajn kolegojn, aŭtoritatojn, sed kion ni vere faras por konigi nian laboron al la ekstera mondo? Kiom da fakaj artikoloj ni aperigas en neesperantistaj fakaj revuoj? Ĉu ni sufiĉe partoprenas en neesperantistaj fakaj kunvenoj? Tio estas la malforta flanko de nia agado, ne nur de ILEI, sed ankaŭ de UEA kaj de la Esperanto-movado ĝenerale.

Al tiu aspekto de nia komuna laboro mi ekde nun volas dediĉi miajn restantajn fortojn. Ekzistas sufiĉe ellaborita agadplano, kiun mi iniciatis antaŭ pli ol dek jaroj. UEA aprobis ĝin oficiale en 1982. Intertempe, ĝi maturiĝis kaj kompletiĝis; mi klopodos agi kunlabore kun Ivo Durwael, estrarano pri informado de UEA. Se vi aprobas tion, ILEI povus starigi komisionon pri informado, kiun mi konsentas, almenaŭ provizore, gvidi.

Jen, karaj gekolegoj, kelkaj donitaĵoj kaj pripensoj pri la laboro farita de via estaro dum la lastaj tri jaroj. Restas al mi la agrabla tasko, elkore danki miajn kolegojn pro la agrabla kaj amika kunlaboro dum miaj du deĵorperiodoj; ili meritas VIAN sinceran dankon kaj aplaŭdon.

Danki mi volas ankaŭ ĉiujn personojn, kiuj aktive kunlaboris kun ni laŭ diversaj manieroj: Mila van der HORST-KOLINSKA, direktorino de la Internacia Esperanto-Instituto en Hago; Claude GACOND, direktoro de la Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds, kiu aktive helpis organizi la instrurajtigajn kursojn, s-ino Irena SZANSER, kiu dum tri jaroj kun granda sindonemo verkis kaj prizorgis la kursojn; Paul PEERAERTS, direktoro de la Grafika Centro en Antverpeno; BARCSAY Zsuzsa kaj KOVÁCS Márta el Budapeŝto, kiuj efike helpis Stefan MacGILL por plenumi multajn taskojn. Mi aparte volas danki nian estraranon en Ĉinio, ZHANG Danchen, kiu senlace, sed izolite, daŭrigas sian konkretan laboron en Ĉinio. Por la multaj rilatoj kiujn mi havas kun Afrikaj kolegoj, mi ĉiam povas apelacii al la helpo kaj konsilo de Hans BAKKER. Estas tiom da aliaj personoj kiujn mi ŝatus danki, sed estas tro por esti kompleta. Apartan dankon mi tamen esprimas al nia kasisto, Bertil ANDREASSON, kiu trovis ĉi tiun lokon kaj prizorgis ĉiujn organizajn aranĝojn pro manko de norvega LKK. Ankaŭ dankon al s-ino Andreasson pro ŝia efika kaj praktika helpo. Estrarano Malcolm JONES, el Britio, kolektis la aliĝojn, korespondis pri la prelegoj, sed bedaŭrinde ne povas ĉeesti nian konferencon.

Elkoran dankon fine al vi ĉiuj, kiuj partoprenas en ĉi tiu 25-a Konferenco.

* * * * *

Donacoj

Ni kore dankas al s-ino D. Leuksen-Burger el Nederlando pro refoja donaco al nia Fondaĵo Szerdahelyi. Per tio la sumo kreskas je 81:25 SEK ĝis 16.597:75 SEK. La celojn de la Fondaĵo vi trovas en IPR 91/1 (p. 36); donacoj estas bonvenaj al la konto de ILEI en Svedio aŭĉe UEA (vidu la dorskovrilon).

Ni dankas ankaŭ tre sincere signifan donacon de 5.350 SEK de s-ino Inger Lannergard el Svedio, kiu post partopreno en nia konferenco, dediĉis tiun sumon al nia eldona agado, kiu rapide intensiĝas. Tia subteno fortigos al ĝi la vojon antaŭen!

Jen la tria, lasta parto de la diplomiga disertacio de STROBL Katalin ĉe la Universitato ELTE en Budapeŝto: 'Apliko de la komunika metodo en la instruado de Esperanto'. La antaŭajn partojn v. en la antaŭaj du numeroj de IPR.

KOMUNIKA ESPERANTA LERNOLIBRO

Tria parto

VORTOLISTO

EN LA URBO

VETURILOJ: buso, tramo, trolebuso, metroo, dentrada fervojo, ŝarĝauto, motorciklo, aŭtomobilo

SIGNILOJ: trafika lampo, barilo, flago, sonorilo, tintilo, signaltabuloj, fajfilo

VETURILELEMENTOJ: rado, sidloko, selo, bremso, kofro, numerplato, licencplato, stirrado, selsako, ĉeno, pumpilo, rapidometro, troleo, pedalo, spegulo, glacoviŝilo

VOJO: ĉefstrato, aŭtoŝoseo, piedira vojo, bicikla vojo, glita, kruta, danĝera, serpentuma, ŝtona, unudirekta /vojo

SURVOJE: haltejo, stacio, super/subpasejo, hospitalo, benzinstacio, parkejo, sukurejo, tendejo, antaŭurbo

TRAFIKI: veturi, vojaĝi, iri, starti, halti, ekveturi, alveni, puŝi, tiri, enbusiĝi, entramiĝi, elbusiĝi, eltramiĝi, preterpasi, turniĝi, parki, ŝofori

AKCIDENTO: kunpuŝiĝi, renversiĝi, panei, ne funkcii, surveturi, rompiĝi, truiĝi, vundiĝi, asekuro, atestanto, policisto

VOJAĜI TRAJNE

STACIDOMO: atendejo, giĉeto, gazetvendejo, bufedo, valizgardejo, horaro, restoracio, perono, relo, relŝanĝilo, semaforo, laŭtparolilo

EN TRAJNO: vagono, lita, kuŝeta, restoracia, vagono, lokomotivo, valizrako, vaka, okupita sidloko, rapida, halta, ekspresa, trajno

FERVOJISTOJ: giĉetisto, konduktoro, portisto, lokomotivestro

VOJAĜI: aĉeti biletojn, envagoniĝi, elvagoniĝi, porti valizojn, atendi, malfrui, mistrafi, bonvenigi, akompani

VOJAĜI AVIADILE

FLUGHAVENO: atendejo, transitejo, doganejo, deponejo de perditaj objektoj

AVIADILO: helikoptero, glisilo, paraŝuto, rulvojo, fuzelaĝo, flugilo

PERSONARO: ĝoganisto, stevardino, pasport- kontrolisto, flugpiloto, flugpirato!

DOKUMENTOJ: enir-talono, pasporto, vizo, unuaklasa bileto, flugbileto

FLUGI: deteriĝi, surteriĝi, kontroli, dogani, alkroĉi la sekureczonon, trairi la kontrolon

VOJAĜI ŜIPE

HAVENO: mara, rivera, haveno, kajo, holdo, kargo

ŜIPO: ferdeko, kajuto, remboato, velŝipo, kajako, kanuo, pramo, pasaĝerŝipo, ŝvebŝipo, aloŝipo

2.4.b. KOMUNIKAJ EKZERCOJ

SITUACIOJ

S1: Vi atendis vian amikon, Petron ĉe la flughaveno longe. Li ne venis kaj vi telefonos al li. Li diras ke li jam sendis telegramon, ke li maltrafis la aviadilon kaj alvenos nur morgaŭ. **Taskoj**

A: *SKRIBU TELEGRAMON* (vi estas Petro)

B: *KOMPLETIGU LA TELEFONKONVERSACION!*

Petro: „Halo, Petro Klein"
Vi: „....."
Petro: „Mi maltrafis la aviadilon. Ĉu vi ne ricevis la telegramon?"
Vi: „....."
Petro: „Morgaŭ, je la 12 -a."
Vi: „....."
Petro: „Kiel iri al vi?"
Vi: „....."
Petro: „Bone. Ĝis sabate !"

C: Petro ankoraŭ ne estis en Budapeŝto.
REKOMENDU AL LI KELKAJN VIDINDAĴOJN!
(vi ankoraŭ ne bone konas Petron kaj ne scias, kio interesas lin)
KLARIGU AL LI, KIE TROVIĜAS LA NACIA MUZEO, OPEREJO KASTELO (vi estas sur Deák tér)

S2: Okazis strata akcidento. La busŝoforo babiladis kun iu turisto, kiu volis scii pli pri Budapeŝto. La ŝoforo ne rimarkis ĝustatempe la motorbiciklon kaj ne donis prioritaton al li. La motorciklisto jam ne povis bremsi, la vojo glitis kaj ili kunpuŝiĝis. A: Vi estas la
turisto
busŝoforo
motorciklisto
pasaĝero en buso
piediranto sur la trotuaro
RAKONTU KIO OKAZIS!

B: Vi estas la piediranto. *TELEFONU LA POLICEJON!*
AMBULANCON!
RIPAREJON! (3 telefonkonversacioj)

C: La policisto venis kaj volas scii, kio okazis.
PREZENTU LA KONVERSACIOJN INTER
LA POLICISTO KAJ LA ŜOFORO
LA POLICISTO KAJ LA ATESTANTO!

D: *1. RIPORTU EN LA TELEVIDO PRI LA AKCIDENTO!*
2. SKRIBU ARTIKOLOJN EN ĴURNALO
EN POPULARA GAZETO!

S3: La familio volas kune decidi, kion fari semajnfine. Vi estas la familianoj.
PROVU KONVINKI LA ALIAJN!
– patro (3-taga ekskurso, automobile)
– patrino (viziti amikojn en Debrecen, trajne)
– Petro (resti hejme)
– Maria (sunbaniĝi, velŝipi ĉe Balatono)

S.4: Via vojaĝo missukcesis. Ĉio malbone iris. Via edzino atendis vin longe. Finfine vi tre malfrue alvenas.

A:	edzino – furioza	**B:**	vi – furioza
	vi – laca		edzino – provas trankviligi vin

IMAGU LA SITUACIOJN! PREZENTU LA DIALOGOJN EN PAROJ!

S5: La stevardino en la aviadilo havas „malfacilajn" pasaĝerojn.
knabo – kiu ĉiam demandas
junulo – kiu koketas kun ŝi
maljunulino – kiu tre timas la flugadon
virino – kiu ege malbonfartas
PREZENTU LA VOJAĜON!

S6: La metroo estas plenplena de pasaĝeroj. Hazarde ĝi haltas inter 2 stacioj. Iĝas pli kaj pli varme kaj ankoraŭ nenio okazas. Post 10 minutoj la vagonaro ekmoviĝas
A : Vi estas pasaĝero en la trajno. *IMAGU KION VI FARUS DUM TIUJ ĈI 10 MINUTOJ! PREZENTU LA SITUACION!*

B: Vi malfruis el la oficejo. *KLARIGU LA KIALOJN AL*
LA DIREKTORO
VIA KOLEGO /amiko/!

DISKUTOJ

D1: Vojaĝo
A: *KOLEKTU LA AVANTAĜOJN KAJ LA MALAVANTAĜOJN DE LA*

TRAJNVOJAĜO	+ + + ---	
ŜIPAVOJAĜO	+ + + ---	
BUSVOJAĜO	+ + + ---	3–3!!!

B: *ELEKTU VETURILON KAJ DIRU KIAL VI PREFERAS VOJAGI PER ĜI!*

C: *PER KIO VI VETURUS AL*
ROMO
DEBRECEN
BALATONO
SINGAPURO? *KIAL ?????*

D2: Ĉu oni bezonas vagonojn por fumantoj?
A: L1 : Vi estas kuracisto
L2 : Vi estas iu, kiu multe fumas
PREZENTU ARGUMENTOJN POR AŬ KONTRAŬ!

B: Vi skribas artikolon en la gazeto. *PROPONU, KE ONI NE HAVU TIUJN VAGONOJN! (kuracisto)*
C: Vi legas la artikolon, furioziĝas kaj tuj skribas ion kontraŭe. (fumanto)

ĈU LA INFORMO SUFIĈIS? (de Stefan MacGill)

Maljuna virino paŝas al la bileta giĉeto de stacidomo. La giĉeto estas fermita, ŝi frapas kaj ĝi malfermiĝas.

Virino: Bonan matenon, sinjoro. Ĉu vi bonvolos doni al mi informon?
Biletisto: Jes, certe, sinjorino. Kion vi deziras scii?
Virino: Kiam foriras la trajnoj al la nordo?
Biletisto: Al la nordo iras tri trajnoj hodiaŭ. La rapida trajno foriros post tri horoj, la malrapida post kvar horoj kaj la *tre* malrapida post ses horoj.
Virino: Bone, do ne ekiras trajno al la nordo ene de unu horo.
Biletisto: Prave. Ĉu vi deziras aĉeti bileton al la nordo?
Virino: Ne dankon. Sufiĉas la informo. Ĝis revido.
Biletisto: Ĝis revido, sinjorino.

Taskoj: 1. Vi estas la biletisto. *KOMPLETIGU LA DIALOGON!*

Virino:
Biletisto: „Jes, certe sinjorino. Kion vi deziras scii?"
Virino :
Biletisto: „Momenton, mi rigardos en mia trajn-libro. *(Li prenas erare sian romanon)* Ha, la malĝusta libro, momenton ... Jen la horaro. La sudo?"
Virino:
Biletisto: „Ne bedaŭrinde. Nur post sep horoj. La vespera trajno foriros je la sesa horo kaj la nokta je la deka."
Virino:
Biletisto: „Bedaŭrinde ne. Ĉu vi deziras bileton por la vespera trajno?"
Virino:

2. *PREZENTU LA DIALOGOJN DUOPE!*
La virino volas scii kiam foriras trajnojal la okcidento
al la oriento.

3. ... La virino eliras, la biletisto frapas sian frunton pro ĉagreno. Dum li serĉas sian libron, ni aŭdas la bruon de rapida trajno, kiu alproksimiĝas kaj pasas laŭ la kajo tuj apud la bileta oficejo. Post momento la virino kaj unu/du anasoj falas en la ĉambron en ŝokita stato. Evidente, la trajno preskaŭ trafis ilin.

A) *FINU LA RAKONTON!*
B) *AŬSKULTU LA ORIGINALAN TEKSTON!*
C) *PREZENTU LA RAKONTON!*

ANEKDOTOJ

Konduktoro: „Vekiĝu, vekiĝu!"
Junulo: „Mi ne estis dormanta!"
Konduktoro: „Sed viaj okuloj estis fermitaj!"
Junulo: „Mi scias, mi simple malŝategas vidi virinojn en plenplenaj busoj!"

Pasaĝero: „Ĉiam, kiam vi rapidegas en la vojkurboj, mi ektimegas!"
Soforo: „Simple faru kiel mi: Fermu la okulojn!"

Petro: „Kiu vojo estas la plej rapida al la hospitalo?"
Mario: „Simple fermu la okulojn kaj iru eksteren sur la straton!"

Skoto: „Kiom da penioj mi devas pagi al vi?"
Portisto: „30 penioj por la unua valizo, 20 por la dua kaj 10 por ĉiuj aliaj!"
Skoto: „Do, bone. Mi prenos la 2 unuajn kaj vi la restajn!"



ĈU VI ESTAS
BONA ATESTANTO?
Rigardu la bildon
dum unu minuto,
poste fermu la okulojn
kaj priskribu la detalojn!

2.4.c. **KONTROLAJ DEMANDOJ**

A. Ĉu vi povas difini la vortojn:
   a) atendejo
   b) barilo
   c) ŝipestro?

B. Kolektu vortojn koncerne
   la ŝipvojaĝon
   la trajnvojaĝo!

1. Kie vi loĝas ? Kiel oni povas atingi vin?
2. Kiujn veturilojn vi preferas? Kial?
3. Vi vojaĝos eksterlanden semajnfine. Kion vi bezonos?
4. Vi veturis aviadile al Londono. Rakontu la vojaĝon!
5. Vi biciklas al la kongreso. Kion vi devas kontroli antaŭe? Kaj se vi vojaĝas aŭtomobile?
6. Kion oni devas fari dum la ŝofora ekzamano?
7. Kio estas la diferenco inter gvidi kaj konduti?
8. Kie ricevas la studentoj rabatojn?
9. Kiel oni iras al la Nacia Muzeo, al Hilton? Kiel oni atingas la klubejon 'Esperejo'? (Ekiru de Astoria).
10. Kion vi faras se via aŭto paneas survoje?
11. Kial oni malpermesas la ŝoforojn drinki alkoholon?
12. Kio kaŭzas la plej multajn stratajn akcidentojn?
13. Ĉu vi volas esti biletisto en trajno? Kial?
14. Ĉu vi scias, kiam estis la plej granda ŝipa akcidento?
15. Ĉu vi ŝatas ŝofori / ŝatus ŝofori? Kial?

3. RIMARKOJ AL AL INSTRUISTO

3.1. PRI LA LIBRO ĜENERALE

La libro postulas jam bazan scion de la lingvo kaj celas prepari la studentojn al la ĉiutaga komunikado. En la plej multaj kazoj la kursanoj estas diversnivelaj: kelkaj jam bone scias la lingvon sed mankas al ili la parolekzercado. Iu, kiu parolas multe da fremdaj lingvoj havas nature pli grandan vortoprovizon ol la aliaj. Ĝuste por ke la diversnivela grupo povu samtempe labori, mi kolektis en la prepara parto bazajn ekzercojn kaj, laŭ la nivelo de studentoj, la instruisto havas la eblecon, doni diversajn taskojn samtempe.

Dum la situacioj kaj la diskutoj ankaŭ ebliĝas diferencigi la studentojn laŭ lingvoscio : doni, unue, la plej grandajn partojn al tiuj, kiuj jam bone aŭ seninhibicie parolas la lingvon, kaj nur poste ŝanĝi la rolojn. Tiamaniere la pli „malfortaj" havas eblecon pli kaj pli alkutimiĝi al la komuniko kaj fine ili eĉ kapablos mem ludi la samajn partojn. Por prepari la kursanojn al la komuniko ankaŭ taŭgas la anekdotoj.

Krom la amuziĝo, ili ankaŭ helpas elformi la komunikan kapablon : Prezenti la anekdotojn oni ne bezonas tiomgrandan kreivecon (la teksto estas jam donita). Tamen, dum la prezentado la studentoj alkutimiĝas al la laŭta, flua parolo, nepre bezonata dum la komuniko. Por tiu-ĉi celo tre taŭgas ankaŭ la skeĉoj de Stefan MacGill.

3.2. PROPONOJ POR LA PREPARAJ EKZERCOJ

Finfine mi ŝatus proponi ideojn koncerne la unuopajn preparajn ekzercojn. La literoj A, B, C, k.t.p., indikas la facilecon de la taskoj. Mi ankaŭ mencias kelkajn ludojn, kiujn oni povas utiligi dum la praktikado:

La **ekzercoj 1, 2, 3** celas ĉefe plivastigi la vortprovizon senrigarde la kontekston.

Taskoj

A: Trovu parojn al la vortoj!
   (substantivojn al la verboj kaj inverse)
   Ekzemplo: ŝofori – - aŭtomobilo

B: Eltrovu la vortojn laŭ la difinoj!
   (la instruisto difinas la vorton kaj la studentoj respondas)

C: Klarigu per aliaj esprimoj la signifon!
   (Nun estas la studento kiu devas priskribi ion laŭ la antaŭa ekzemplo de la instruisto)

Ludoj

1) Barkoba ludo
2) Trovu vian partneron!
   (Oni skribas la vortojn sur paperpecojn la instruisto suprenĵetas la pecojn, la studentoj kaptas unu kaj devas trovi ĝian paron.
   Ekzemplo: trajno – vagonaro.

Tiuj, kiuj laste trovas unu la alian, elfalas. La ludo daŭras ĝis kiam nur unu paro restas.)

Ekzerco 4 kombinas la gramatikan kaj leksikan praktikadon:

Taskoj

A: Trovu la verbojn al la donitaj vortoj!
Ekzemplo: tramo — - trami
(ĉi-tie eblas atentigi la studentojn al la diversaj esprimeblecoj de la sama afero.
Ekzemplo: vojaĝi per tramo, vojaĝi trame, trami)

B: Komparu la veturilojn!
(La instruisto elektas po tri vortojn de la listo kaj petas la studentojn diri frazojn per ili. Oni eĉ povas organizi konkurson: Kiu povas diri la plej multo de la frazoj dum unu minuto?)

C: Kiun veturilon vi preferas?
Argumentu! Ĉu vi konsentas?
(Ĉi-tie oni jam postulas de la studentoj esprimi sian opinion.)

Ekzerco 5 preparas al la situacio „Okazis strata akcidento"
(vidu pli detale ĉe la situaciaj ekzercoj). La tasko atentigas la lernantojn al diferencoj.
Ekzemplo: kofro (aŭtomobilo) — - selsako (biciklo).

Taskoj

A: Diru kie la unuopaj veturilelementoj troviĝas!
Ekzemplo: glacovizilo — - antaŭa parto de la aŭto.

B: Rigardu la vortojn en 5.a! Diru, kio povas okazi per la elementoj se okazus akcidento.

Ekzerco 6 kolektas la plej gravajn vortojn koncerne la vojaĝon:

Taskoj

A: Formu la vicordon inverse!

B: Vi vojaĝos
trajne
buse al Parizo
Anstataŭu la respektivajn vortojn!
Ekzemplo: enaviadiliĝi — - enbusiĝi.

C: Via avino invitis vin al Parizo. Rakontu la vojaĝon!

Ekzerco 7 atentigas la studentojn pri la kreiveco de la lingvo: helpe de la afiksoj oni mem povas krei vortojn, kiuj ne estos en la vortaro, sed ĉiuj komprenus ilin. Ofte oni devas klarigi al fremdlandanoj specialajn vortojn, specialajn konceptojn, kiuj ne ekzistas en aliaj lingvoj. 7.c instigas la studentojn precize klarigi specialajn hungarajn esprimojn.

Taskoj

A: Trovu aliajn vortojn kiuj finiĝas same
— isto
— ejo
— ilo!

B: (Oni invèrsas la taskon) Trovu la sinonimojn!
Ekzemplo: malsanulejo — - hospitalo

Ekzerco 8 praktikas la plej oftajn verbojn koncerne la veturadon. Surbaze de la tabuloj oni povas montri kaj klarigi la diferencon inter **povas, rajtas, devas**, kaj samtempe ludi.

Se oni vizitas Esperantistojn aŭ gastigas ilin, ofte okazas ke oni devas informiĝi pri la nekonata lando aŭ urbo. **Ekzerco 9** praktikas tipajn, en tiuj situacioj uzeblajn frazojn, ĝentilecformojn.

Taskoj

A: Ludu la dialogojn duope!

B: Elektu unu lokon sur la mapo kaj klarigu al ni kie ĝi troviĝas!

C: Kiel oni iras al ... ? Kaj reen ... ?

(Mi uzis simpligitajn signojn por ke oni povu rapide desegni ilin sur la tabulon).

Para ludo : Unu de la partneroj desegnas mapon helpe de la donitaj signoj kaj priskribas al la alia, kie ili troviĝas sur la mapo („torpedo" ludo)

En naturaj konversacioj ambaŭ partneroj ofte demandas. Al multaj studentoj fari demandon estas ege malfacile. **Ekzerco 10** praktikas tiun kapablon. Mi elektis la ekzemplojn el la libro de rekordoj (1985) por plivigligi la interesiĝon de la studentoj.

4. BIBLIOGRAFIO

1. BRUMFIT, C. (1984) Communicative Methodology in Language Teaching Cambridge : University Press
2. LITTLEWOOD, W. (1981) Communicative Language Teaching Cambridge : University Press
3. WRIGHT, A., BETTERIDGE, B. (1984) Games for Language Teaching Cambridge : University Press
4. MATHEIDESZ, M. (1987) The name of the game Budapest: Tankönyvkiadó
5. ALEXANDER, L.G. (1971) For and Against Hong Kong : Scheck Wan Tong
6. BIECHELE, W. HESSKY, R. (1987) Aktuelle Themen Budapest: Tankönyvkiadó
7. AUFDERSTRASSE, H., BOCK, H., MULLER, H. (1983) Themen München : Max Hueber Verlag
8. ABBS, B., FREEBAIRN, I. (1980) Strategies 3. Harlow : Longman
9. BODOCZKY, C., CSONKA, M. (1982) Do you speak English? Budapest: Statisztikai Kiadó Vállalat
10. MACGILL, S. (1986) Ĉu la informo sufiĉis? Juna Amiko p.15–18. Budapest: MESZ
11. Das Neue Guinness Buch der Rekorde (1985) Hamburg : Ullstein
12. PIRON, C. (1987) Créativité et Expressivité, Studoj pri la internacia lingvo Ĝenevo: Aimav

Estontaj eventoj:

Simpozio pri komercaj rilatoj kun Azio pere de Esperanto okazos en Ostendo, Belgio de la 2a ĝis la 9a de oktobro 1991. Sub la prezido de s-ro G. Maertens, prelegos Kees Ruig el Nimego, Nederlando, George Sossois, Belgio, s-ro F.J. Braun, prezidanto de Internacia Komerca kaj Ekonomia Fako (IKEF), ĵus reveninta el vojaĝo tra Azio kaj prof. Shen Chenru, vic-prezidanto de la Sciencista kaj Teknikista Esperanto-Asocio de la Ĉina Akademio de Sciencoj, kies iniciato estas la simpozio. Minimuma partoprenkotizo 300BEF al konto 850-8836110-57 de Esperanto-Klubo 'La konko', Paul Michielslaan 10, B-8400 Oostende.

Internacia Festivalo: la konata ĵarŝanĝa aranĝo por personoj 25-55 jaraĝaj kaj junaj familioj, frataranĝo al la junulara IS, okazos okafoje, en Sensenstein (FR Germanio) de la 27a dec 1991 ĝis la 3a de januaro 1992. Pluraj Esperantaj familioj regule partoprenas kaj la infanoj ricevas riĉan kaj atentan prizorgon, en Esperanto kompreneble. Ekskursoj, silvestra bufeda balo, vesperaj programoj planataj. La ejo havas saŭnon kaj gimnastikejon. Kotizo por plenkreskulo 320DM ĝis 30 nov, poste 360 DM. Petu aliĝilon kaj informojn: Hans-Dieter Platz, Postfach 1148, D-W-3501 Niedenstein, Germanio.

Internacia Junulara Kongreso: La 48a IJK okazos de la 2a ĝis la 9a de aŭgusto 1992 en Montrealo, Kebekio, Kanado, kun ĉeftemo 'Libertempado'. La kongresejo estas moderna klimatizita altlernejo, la dormejoj estos la klasĉambroj kun matracoj surplanke. Kotizoj varias de 200 ĝis 350 kanadaj dolaroj, depende de aĝo kaj aliĝdato. Petu la kolore presitan unuan bultenon kun aliĝilo de la CO de UEA/TEJO aŭ de LKK, 6358A, rue de Bordeaux, Montréal, Québec, H2G 2R8, Kanado.

26a ILEI-konferenco: La nova estraro intense korespondas kun ĉeĥaj kaj slovakaj kolegoj, cele al konferenco ĉu en Brno ĉu Bratislavo, antaŭvidate tuj post la UK en Vieno. Ni klopodas obligi la partoprenon de instruistoj el la reform-eŭropaj landoj. Informoj kaj aliĝilo aperos kiel eble plej baldaŭ.

Lerneja Enketado:

ILEI pasintjare ne lanĉis enketon pri la instruado, sed la aldono de novaj laborfortoj aŭdacigas nin tion fari ĉi-numere pri lernojaro 1991/92, cele al aperigo de la rezultoj en numero 92/1 de IPR en marto 92. Tio devas permesi la starigon de kontaktoj ankoraŭ dum la kuranta lerneja jaro. Ni starigos komputilan datumbazon pri la lernejoj, por povi resti en kontakto kun ili. Se viaj klasanoj deziras eksterlandajn kontaktojn, nepre plenskribu la respondilon meze en ĉi tiu IPR kaj resendu ĝin kiel eble plej baldaŭ.

KONCIZE NI NOTAS

Universitata Enketado:

S-ro Germain Pirlot enketos la naŭan fojon pri tria-gradaj kursoj kaj jam dissendis la respondilon. Ĉiu kursgvidanto nepre plenskribu ĝin kaj resendu ĝin ĝis plej malfrue la 15an de aprilo 1992. Se la informoj estas jam sciataj, ne prokrastu, tuj resendu ĝin, antaŭ ol ĝi entavoliĝu en vian poŝtomonton! Se koncernato ne ricevis la respondilon, petu ĝin de Germain Pirlot, Steenbakkersstr. 21, B-8400 Oostende, Belgio.

Studkurso pri turismo:

Monda Turismo kun aliaj instancoj organizas naŭmonatan studumon en Bydgoszcz de septembro 1991 ĝis majo 1992, entenanta ĉ. 1500 horojn da lekcioj kaj seminarioj. La tuta kurso kostas 600 US$, partopreno en unu-semajna preleg-sesio 200 gld., kun loĝigo kaj manĝado inkluzivita. La kurso ampleksas fakajn temojn pri turismo, kursojn en naciaj lingvoj por turisma uzo (angla, rusa, franca, germana, litova, Esperanto), kaj de 22a de decembro ĝis la 4a de januaro 1992 internacia pedagogia Esperanto-kurso gvidata de M. Dobrzynski, T. Nemere, E. Malewicz kaj A. Zacharias). Petu informilon de: Esperantotur, Str. M. Sklodoskeij-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando.

Vorto-mozaiko konkurso:

Tokia Esperanto-Kooperativo, P.O. Kesto 233, Sinzyuku, Tokyo-to, 163-91 Japanio, ĵus reeldonis sian popularan kaj en kursoj ege uzindan ludon 'Vorto-mozaiko'. Honore al la relanĉo ili anoncas ĉiujaran konkurson, kies rezulto devas atingi ilian adreson dum decembro. Plenaj detaloj de la konkurso estas senditaj kun ĉiu ludkompleto. Ĉiujare ili aljuĝas tri premiojn, du de 50 gld. plus ludkompleto kaj unu de 100 gld. plus du kompletoj. La ludkompleto konsistas el 101 bele presitaj kartonaj kartoj , reviziita regularo. , pakita en praktika kompakta bone fermebla plasta ujo (60x70x40mm). Prezo ne indikita; mendebla de TEKO aŭ aliaj ĉefaj libroservoj.

Edukaj vidbendoj:

Aperis en revuo Esperanto, feb 1991, listigo de la disponeblaj bendoj. La koncernaj eldonejoj estas Internacia Kultura Servo, Pf. 499, YU-41000 Zagreb, Literatura Foiro, via Pantano 17, I-20122 Milano, Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Roman Dobrzynski, Majdanska 13/91, PL-04-088 Warszawa kaj Sarlanda Esperanto-Ligo, Günther Becker, Alter Hangarten 2, D-W-6653 Blieskastel, Germanio. Tiulasta povas proponi programojn en VHS (PAL kaj SECAM) kaj Video 8, kaj proponas bendon pri la ILEI konferenco en Hanabanilla. Ĝi havas serion da registraĵoj de prelegoj el kulturaj semajnfinoj; i.a. de profesoroj Régulo Perez, Duc Goninaz, Eugene De Zilah, Helmar Frank, Eddy Borsboom, Ulrich Lins, Yosimi Umeda kaj seshora prezentaĵo de prof. Szerdahelyi pri aktualaj problemoj de interlingvistiko kaj Esperantologio. Bendokosto estas 50DM por 3 horoj. Vidu la liston de programoj en Esperanto, aŭ petu de SEL aktualan katalogon. IEI proponas ĉefe bendojn de Cseh-metodaj kursoj, i.a. gvidataj de Audrey Childs-Mee.

26-lingva vort-tradukilo:

Aperis el Honkongo poŝaparato kun dikeco de kreditkarto (55 x 85 x 4mm: 40 gramoj), kiu tradukas 26.000 vortojn en 26 aliajn lingvojn, inkluzive Esperanton. Ĝi entenas la materialon de la Konciza 26-lingva Vortaro Lyle Stuart. Ĝi ne havas alfabetan klavaron, necesas selekti per direktobutonoj la unuajn du literojn de la tradukenda vorto, poste selekti la deziratan el listo, poste indiki la cellingvon (ĉiu havas flagomontran klaveton). Ne estas klare ĉu eblas peti la tradukon el kiu ajn el la 26 lingvoj. Ĝi estas reklamata en Francio, mendebla je 395FF de 'M comme Maison', Z.I., B.P. 77, F-37150 Blere. Unu ĝia reklamo listigas la lingvojn asignante ĉiun al unu lando (Angla: USA; Hispana: Hispanio; Germana: Germanio; Svahila: Tanzanio) kio estas lingvistike naiva, krome ĝi karakterizas Esperanton 'Lingvo eŭropa'. Ĝi donas grekajn, rusajn, arabajn kaj serbo-kroatajn tradukojn, sed transskribitaj al romia alfabeto, la japanan ĝi donas romie kaj japane (supozeble en la fonetika alfabeto katakana au hiragana). La lingvo-nomoj sur la aparato mem estas anglaj. Du esperantistoj atentigis la redakcion pri la varo, raportoj pri spertoj de eventuala aĉetinto bonvenas.

Monda merkato:

Novtipa gazeto aperis el Germanio, kiu celas kontaktigi esperantistojn, kiuj volas korespondi aŭ komerci internacie. Ĝi portas iliajn anoncetojn, aranĝitaj laŭ ampleksa tem-katalogo. Precipe al esperantistoj izolitaj per nuntempaj ekonomiaj kaj politikaj perturboj ĝi estas tre valora iniciato. , kies sukceso ja dependos je la bonvolo kaj bonkonduto de la partoprenantoj, ĉar tia servo estus facile misuzebla. La gazeto mem estas senpretenda, sed grafike tre neta, la tuta projekto zorge trapensita kaj klare prezentita. Abono 5 DM por kvar numeroj aŭ 4 irpk. Skribu al: Linguistisches Bureau Alfred Schubert, Postfach 1539, D-W-8120 Weilheim (pĉk. 365255-806, bankkodo 70010080 München.

Sekcioj:

Ni bonvenigas novajn sekciestrojn en Belgio (s-ro Alex Humet), Estonio (Eve Otsa) kaj Svislando (s-ino Nicole Margot). Kvankam en Pollando ne eblas jam nomi sekciestron, la E-Centro en Bialistoko peras membriĝojn pageblaj zlote, transigataj tra la hungara sekcio. Norvegoj bv. kontakti nian kasiston. Jusa vojaĝo de Soponyai Mária en Rumanion permesas raporti la nomigon de reprezentanto tiulande: Angela Stoica, str. Platanilor 17, Sc. C, ap. 4, R-1900 Timisoara; tel. (961) 59806. La vojo ŝajnas nun malferma al starigo de sekcio ĝis la jarfino.

Ekzamenoj

Tra la somero intensa serio de ekzamensesioj certigis rekordan jaron por la mezaj kaj elementaj ekzamenoj de UEA/ILEI. Meze de julio okazis en Veliko Tirnovo, Bulgario, sesio kun 12 mezgradaj sukcesintoj kaj unu elementa. Aldonu la 9 plus 6 sukcesintojn en la UK, kaj plie 18 (13 + 5) el du ĉinaj sesioj, unu en la universitato de Anhui en Heifei, alia en la universitato de Guangzhou (Kantono). Ne forgesante la 23 sukcesintojn en Rumanio aprile, ni havas jam pli ol 150 sukcesintojn de post la relanĉo. Septembre aldoniĝos sesio en Belgio, eble en Subotica, Jugoslavio, depende de eventoj, oktobre en Vraca, Bulgario, kaj Szombathely, Hungario, decembre en la Afrika Kongreso – sendube do rekorda jaro.

Sekciaj raportoj

El la 'nigra listo' de neraportintaj sekcioj en la antaŭa numero bv. forstreki Svedion, kies raporto restis ĉe la kasisto. La ceteraj 'nigralistuloj' spertos la dolĉan atenton de nia nova estrarano pri membraro kaj sekcioj!

Prilingvaj afiŝoj

En la Tago de la Lernejo en Bergeno vekis grandan interesiĝon tri afiŝoj pri la nombro de parolantoj de diversaj lingvoj, kaj laŭlanda analizo de la troveblo de miliono da esperantistoj. Multaj kongresanoj venis poste al la podio por fari 'fotokopiojn' de ili, t.e. ili fotis ilin. Ni promesis aperigi ilin en IPR, sed pro spacomanko ili povos aperi nur en la venonta numero; kune kun eĉ pli aŭdaca analizo.

Rumanio

Ekde oktobro ĝis julio 1992 disaŭdiĝos radiokurso dum duonhoro ĉiusemajne en la nacia radio, sub prizorgo de profesia redaktoro kaj esperantisto, d-ro Marian Constantinescu el Bukureŝto. La 38 lecionoj havos la sekvan strukturon: 12 minutoj: prezento de korektaj solvoj al traduk-ekzercoj el la antaŭa elsendo, 4 min.: vortaro por la nova leciono, 8 min.: du traduk-ekzercoj Esperante\rumane, 5 min.: diversaj informoj pri la Esperanto-movado. Simila kurso okazis jam ĉi-jare.

Ukrainio

La Centro Esperanto, P.O. Kesto 539/1, SU-254200 Kiev; telekso 131498 PTB, anoncas deziron organizi kursfinajn renkontiĝojn 5- ĝis 7-tagajn en Kievo por eksterlandaj grupoj. Tiuj povos esti por unu grupo el eksterlando, aŭ por kelkaj samtempe, tiel formante internacian rondon. Enlandaj kursanoj aldoniĝos. La programo povos inkluzivi ekskursojn, konkursojn, renkontiĝojn kun lokaj esperantistoj kaj kursoj, sed estas adaptebla al la deziroj de mendantoj.

Asemblea protokolo

Ni intencis aperigi tiun protokolon en IPR, sed premo je spaco malebligas tion, do ni dissendos la teksto al la sekcioj; kiu volas vidi ĝin bv. kontakti sian sekcion aŭ skribi al Budapeŝto. Ni dankas al Rob Moerbeek pro la atenta notado!

Ni esploru la mondon

Sur paĝo 29 de IPR 91/2 ni anoncis la aperon de tiu kajero, ricevebla el San Diego. Notu, ke la eldonintoj povas sendi ĝin senpage nur al kursgvidantoj kaj instruistoj, kiuj fotokopiu ĝin por klasanoj. Ili ne povas senpage disponigi ĝin al unuopaj infanoj. S-ino Kohrs anoncas, ke dua kajero en la serio estas nun preparata. Plie, elementa lernejo en Freese, San Diego anoncas interŝanĝon de materialo surbaze de 'Ni esploru la mondon'. Plenaj detaloj aperos en la preparata **Juna amiko** 91/3.

KOMPILIS SMG

MANUSKRIPTOJ POR IPR

Ni petas aŭtorojn noti siajn adresojn sur la manuskriptoj mem; ni aperigos ilin, tiel ke legantoj povu reagi rekte al verkintoj kaj lanĉintoj de iniciatoj. Se via manuskripto estas bele kaj nigre tajpita sen manaj korektoj, ni povas aŭtomate komposti ĝin.

LASTA VOKO: INSTRUISTOJ, NEPRE SENPROKRASTE PLENSKRIBU LA ENKETILON PRI INSTRUADO!!

HONORAJ MEMBROJ

Peter Zlatnar (YU, 1984) – Mario Dazzini (I, 1985) – Erbetta Marcel (CH, 1986)
Irja Klemola (SF, 1986) – Olle Olsson (S, 1986) – Jozef Toczyński (PL, 1986)
Helmut Sonnabend (D, 1987) – Catina Dazzini (I, 1988) – Szerdahelyi István (H, 1988)
M.H. Saheb-Zamani (IR, 1989)

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Argentino : Herminia Kirkerup de Fernandez (s-ino), Calle Cerrito 1.249, Barrio San Martín, RA-5000 Córdoba, (Córdoba)
Aŭstrio : Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgio : Alex Humet, Van Campenhoutstr. 4, B-2600 Berchem
Brazilo : Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 São Paulo SP
Britio : Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 82D
Bulgario : Ivanka Spasova, j.k. Lenin bl. 20, vh. 3, BG-1124 Sofia
Ĉeĥio : Vêra Barandovska, Volgogradská 41, CS-70400 Ostrava 3
Ĉinio : Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normal University, 430070 Wuhan, PR China
Estonio : Eve Otsa, Liivalaia 30-12, EST-200001 Tallinn, Estonio
Finnlando : Synnöve Mynttinen, Keskussairaalankatu 5 M 133, SF-15850 Lahti
Francio : Edmond Ludwig, 26 Route de la Schlucht, F-68140 Münster
Germanio : Stefanie Tucker, Alatseestr. 14, D-W-8900 Augsburg
: Till-Dietrich Dahlenburg, Feldstr. 13, D-O-2722 Brüel
Hispanio : Manuel López Hernández, Poŝtkesto 832, E-41080 Sevilla
Hungario: : Márta Kovács, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest
Israelo : Murĵan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
Italio : Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa
Japanio : Toi Kunio, 1448-1 Simotakajyanagi, Kazo-si, Saitama 347
Jugoslavio : Sonja Tavčar, Liminijanska 6, YU-66320 Porotorož
Korea Resp. : Gilsu So, Sodaemun, P.K. 59, Seoul-120
Nederlando : D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
Nordameriko : Doroteo Holland-Kaupp, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono
Norvegio : *vakas*
Pollando : *Turnu vin al E-Centro Bialistoko, ul. Piasta 52/21, PL-15-044*
Portugalio : Alexandre Kasesa, Rua Actriz Palmira Bastos 10, 4'B, P-1900 Lisboa
Sanmarino : Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, I-43031 San Marino
Slovakio : Anton Zachariáš, Sobotské námestie 6, CS-05801 Poprad
Sud-Afriko : Japie Spoelstra, Posbus 20185, Noordbrug 2522, Suid-Afrika
Svedio : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24294 Hörby
Svislando : Nicole Margot, Tour Grise 28, CH-1007 Lausanne
Venezuelo : Inĝ. Felix Garcia Blasquez, Apartado 75.090, YV-1070 A Caracas
Zairio : Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

REPREZENTANTOJ

Bangladeŝo : Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000
Centrafr. Resp. : Luc Feidangai, B.P.960, Bangui
Ĉilio : Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago
Hindio : Abani Halter, Jamboni, P.O.Bolpur 731204, W. Bengal
Irano : Mohammad Karamudini, P.O.Box 13445-747, Tehran/Iran
Niĝerio : Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Epoma Bendel
Rumanio : Angela Stoica, Platanilor 17, Sc. C, ap.4, R-1900 Timişoara; tel.(961) 59806
Tanzanio : Mramba Simba, S.L.P. 1051, Bunda Mara

LABORKOMISIONOJ

Statistiko : Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, B-8400 Oostende; tel. (059) 70.87.00
Didaktikaj lud(il)oj : Georges Sossois, rue du Basson 79, B-6001 Marcinelle; tel. (071) 43.62.05
Eŭropa Komunumo 92 kaj informado en internaciaj pedagogiaj medioj :
E. Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (32 3) 666.62.66
UN-Jaro de la Familio 94 : MacGill-Glossop
Gazetara Servo : W. Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien, Aŭstrio; tel. (43 222) 36.86.29
Terminologio : K. Smideliusz, Apáczai sétány 10, H-9700 Szombathely, Hungario; tel. (36 94) 20-313
Statuto : O. Hoekstra & R. Moerbeek, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl, Nederlando; tel. (31 2209) 15.65

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO : (Rilatoj de reciproka informado, Kategorio C), 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris.
Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, F-75010 Paris
UEA : Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam
IEI : Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag
KCE : Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

Kontribuaĵoj al IPR

tajpitaj nete per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj, aŭ komputile sur 5,25-colaj disketoj per IBM-PC-kongrua sistemo kaj konata tekst-prilaborilo, al la adreso de la Redaktejo (vd. kovrilpaĝon). Skribu viajn nomon kaj adreson sur la manuskripto.

Abonado al IPR kaj membriĝo al ILEI:

(membrokotizo 50 Svedaj Kronoj)

1) poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). «La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj» (ILEI). Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby (Svedio).
2) poŝtĝirkonto: 3789 64 de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando), por la interna konto ILEK-A de ILEI.